

pola

sendependa revuo
de polaj esperantistoj

esperantisto

fondita en 1906 ★ n-ro 3/2006 ★ ISSN 0032-2431

Amikeco trans limoj

Niaj leteroj, retmesaĝoj
trans landaj limoj flugas for,
plenaj de homa bonvolemo,
de afableco kaj favor'.

Dank' al la lingvo Esperanto,
kara amiko, amikin',
por mi fariĝis vi proksima,
trans limoj io ligas nin.

Sendube estas ĝi la sento
de nia vera amikec',
disvolviĝinta en la koroj
pere de lingva unuec'.

Kie ajn vivas ni hodiaŭ
en la belega, vasta mond',
la VERDA STELO nin venigas
al familia, granda rond'.

En ĉi-rondego familia
sur Esperanta fundament',
ni kontribuas al la PACO,
al nova vivo en konsent'.

Czesław Baranowski

3

2006
Jubilea jaro

Enhavtabelo:

| | |
|----|---|
| 3 | Re(d)akcie... <i>Kazimierz Leja</i> |
| 4 | Adam Mickiewicz — Larmoj puraj. <i>Lidia Ligeza</i> |
| 12 | En la intertempo de la du militoj — du polaj anoj de la Lingva Komitato en Parizo <i>Jean Amroux</i> |
| 15 | Ĉu internacie inda kaj interesa? Esperanto-kulturo el tutmonda perspektivo <i>Sabina Shun</i> |
| 25 | Stanisław Lem (1921–2006) <i>Tomasz CHmielik</i> |
| 28 | Pri polaj eventoj ktp. <i>Andreas Künzli</i> |
| 29 | Polaj eventoj <i>Jan Stanisław Skorupski</i> |
| 31 | Genealogio kaj nacilingvaj vortlistoj <i>Edward Wojtakowski</i> |
| 32 | Tombejo apud Bjalistoko <i>Vladimir Bogomolov (St. Śmigielski)</i> |
| 33 | Preskaŭ ĉio pri la prepozicio PER <i>Czesław Baranowski</i> |
| 35 | Solena Jubileo de Krakova Societo Esperanto kaj Pola Esperantisto. |
| 36 | Judaj anekdotoj kaj ŝercoj <i>Josef Shemer</i> |

*Al la
duobla Jubileulo
— kolego Czesław
Baranowski —
la redaktantoj de PE
deziras plurajn sanajn
kaj prosperajn jarojn de
la vivo kaj la agado!*

Pola Esperantisto
sendependa revuo de polaj
esperantistoj. Aperas 6 fojojn jare.
N-ro 3/2006 – ISSN 0032-2431
eldonkvanto (naktad): 260 ekz.

Redaktas: Tomasz Chmielik, Kazimierz LEJA
(ĉefredaktoro), Lidia Ligeza. Konstantaj
kunlaborantoj: Czesław Baranowski,
Danuta Kowalska, Teresa Nemere, Stanisław
Śmigielski.

Ĉiujn korespondaĵojn kaj kontribuojn sendu
al la Eldonejo HEJME:

TTT-paĝo: www.hejme.com.pl

Retpoŝto: hejme@hejme.com.pl

Tel.: (+48 32) 265 00 38 (nur vespere!)

*La redakcio rezervas al si rajton
mallongigi kaj korekti la tekstojn.*

Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al:
Wydawnictwo Hejme, PL 41-250 Czeladź,
str. Wąska 21, skrytka 59
mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda
al: UEA-konto: <kazl-s> aŭ FEL-konto:
<leja-t>. Por aerpoŝta sendado aldonu 6
EUR. Nrepre informu eldonejon pri via pago!

Kazimierz Leja

Re(d)akcie...



Atendante la duan en mia vivo Universalan Kongreson de Esperanto (la unuan mi partoprenis en Varsovio, 1987), mallong-distance mi vidas partoprenantojn de la centjara jubileo de Krakova Societo Esperanto... La aranĝo bone preparita, interesa, kvankam io mankas... Mankas multaj homoj, kiuj povus partopreni ĝin sed elektis resti en siaj hejmoj. Eĉ tiuj, loĝantaj en Krakovo...

La Florenca Kongreso certe evidentiĝos unu el la plej multnombraj aranĝoj (skribante ĉi tiujn vortojn mi vidas la nombron de 2063 partoprenantoj. Poloj sur la listo estas 126).

Sed kial kompari tiujn du eventojn? Ja UEA postulas grandan monon de esperantistoj, kiuj — onidire — estas ne tro riĉaj (kvankam kun tio mi tute ne samopiniis). Kontraŭe — lokaj kongresoj, solenaĵoj, estas organizataj *ekonomie*, por kovri nur necesajn elspezojn de organizantoj.

Kompari tamen oni necesas. Se la Universalaj Kongresoj allogas tiel multajn samideanojn, certe tiuj lokaj eventoj devas esti ankoraŭ pli bone reklamitaj kaj eble — pli multekostaj?

Kaj ĉi tie niaj legantoj povas diri: internaciaj eventoj donas ŝancon ekoni eksterlandanojn, admiri belecon de aliaj landoj, lokoj, kutimoj. Jes! Tio estas vero. Tial almenaŭ ĉiun duan ja-

ron polaj esperantistoj devus prepari — similan al la UK — *grandan* landan kongreson, kun partopreno de multaj eksterlandaj gastoj, organizatan de loka aktivularo, nepre helpata de tutlanda E-organizaĵo.

Kaj tiumomente... neatendite finiĝas la revoj. Lokaj aktivuloj, kvankam ne tro multnombraj, ne mankas en nia lando. Mankas tamen emocii komune, organizi ion ajn, pri kio la mondo parolus kaj skribus, kaj kio allogus denove multajn partoprenantojn. Ĉu revenos la tempo, kiam 1000-persona partoprenantaro plenumigos la plej famajn teatrojn, operejojn, TV kaj gazetaro volonte, sen ripetataj petegoj, raportos abunde pri esperantistoj kaj iliaj aranĝoj, vidante en ili nemalgrandan, socie bezonatan Movadon, ne nur kun neplenumeblaj idealoj (legu = naivuloj)?

Ĉio povas okazi. Dependas de ni mem. Unuopuloj kaj lokaj, malgrandaj E-grupoj, kiuj volas denove ĝui la etoson de tutlanda, granda kaj rekonata E-organizaĵo, unuiĝu! Federacio de Polaj Esperantistoj — pri kiu ĝis nun oni nur parolas — estas eble la lasta ŝanco por ni ĉiuj. Alikaze neniam ni venkos stagnadon de nia landa movado. Do, komencu pensi kaj agi por la Afero. *Pola Esperantisto* estas je via dispono. ♣

Lidia Ligęza

Adam Mickiewicz

Larmoj puraj



En la jaro 1855 mortis la granda, pola poeto Adam Bernard Mickiewicz (*24.12.1798 — †26.11.1855). Okaze de la 150a morto-datreveno valoras koncize rememorigi lian silueton kaj verkon, precipe prikonsiderante aferon de lia matura liriko, ne ĉiam sufiĉe rimarkatan.

Patro de la poeto, Mikołaj (Nikolao), devenanta de eta nobelaro, juristo, loĝis kun la edzino Barbara el familio Majewski en la urbeto Nowogródek apud Grodno (hodiaŭa Belorusio). Tie naskiĝis kaj travivis la feliĉan infanaĝon ilia filo. Tri malfacilaj por la 22-jarulo faktoj rompis tiun idilion — incendio de la urbo, morto de la patro kaj epopeo de Napoleono. La personeco kaj agoj de la franca heroo tiom ravigis la junulon, ke komencante studi li faris tion sub duobla nomo: Adam Napoleon.

En la jaro 1815 Mickiewicz venas al Vilno por studi en unu el la plej bonaj polaj universitatoj. Bela, pitoreska urbo kaj ties vere scienca atmosfero kaŭzis lian rapidan maturiĝon kaj disvolviĝon. La poeto studis literaturojn grekan kaj romanajn ĉe la elstara filologo, prof. Ernest Groddeck, poezion kaj dikcion ĉe Leon Borowski kaj historion ĉe juna, sed jam fama Joachim Lelewel. Multe da tempo Mickiewicz ankaŭ dediĉas al Societo de Sciencamantoj, sekreta porstudenta organizaĵo, celanta memperfektigon, poeziajn ekzercojn kaj studadon de la laŭmodaj pensuloj, ekz. Voltaire, fondita de li, Tomasz Zan kaj Józef Jezowski.

Unua presita poemo de Mickiewicz „La urba vintro” (Tygodnik Wileński — La Vilna Semajngazeto, 1818), satira bildo de la junularaj amuzoj, observas ĝis la humora troigo, klasikajn metodojn verki. Havante ankoraŭ multajn verko-planojn kaj parte ilin realigante — la poeto rezignas de klasikismo nur en gajaj, senpretendaj versaĵoj verkataj por la amika rondo.

En la jaro 1819 Mickiewicz translokiĝas al Kovno, kiel instruisto en la mezlernejo. Libertempon de la jaro 1820 li trapasis en bieno de la grava familio Wereszczaka (Vereŝĉaka), kio kaŭzis amkomplikaĵojn, ĉar lia elektitino Marila estis jam fianĉino de grafo Wawrzyniec Puttkamer. En tiu tempo la poeto studas verkojn de Schiller kaj Goethe kaj serĉas novajn esprim-rimedojn fo-

rirante de la raciismo, ekz. en la balado „Lilioj”. Doloro post morto de la patrino kaj post nupto de Marila kaj Puttkamer (1921) igis profundan ŝanĝon en lia psika sinteno, suferoj de la propra mio fariĝis la plej esencaj dum la procezo krei. „Odo al la juneco” montranta forton de enuziasmo kaj „Romantiko”, agnoskanta „veron vivan”, apogitan je la sento, estas por li la turnopunkto survoje al romantismo. La dua versaĵo estas ankaŭ polemiko kontraŭ Jędrzej Śniadecki, sciencisto, kiu akre kondamnis la germanan romantismon, ĉefe ĝian emon al la fantazia mondo de spiritoj, najadoj kaj vampiroj. Mickiewicz perdas senton de komuneco kun kolegaro, tiel klare videblan en la „Odo al la juneco”. Versaĵo „Navigisto” (1921) substrekas solecon kaj apartecon de la homo sur la tempesta maro: „Volante juĝi oni devas esti ne kun mi, sed en mi”.

Junie de la jaro 1822, Adam Mickiewicz eldonis la unuan volumon de „Poemoj”. Ĝi konsistas el „Parolo pri la romantisma poezio”, „Baladoj kaj romanoj” (14 poemoj), kaj el „Versaĵoj diversaj”. Mankis „Odo al la juneco”, la aŭtoro rezignis pri ĝia aperigo timante klopodojn fare de la caraj cenzuristoj. Negranda libreto, plena de interesaj scenoj kaj herooj, apertis landon de mirakloj, sekretoj de la malracia, popola imago. Ne tro plaĉas nune troa sentemo de la certaj baladoj, sed plu ĉarmas simpleco de „Reveno de la patro”, humoro de „Sinjorino Twardowska”, hororo kaj severa justeco de „Lilioj”.

La dua volumo de „Poemoj” (1823) estas ankoraŭ pli interesa. „Graĵina, litovia romano”, vasta poemo utiliganta la baladan teknikon kun sekretoj, gradado de gravaj scenoj kaj etoso, malordinareco de la okazintaĵoj, rememorigas verkojn de Walter Scott pri la kavalira pasinteco kaj ekzoton de la verkoj de Byron. Mickiewicz volis rakonti ne nur pri pratempaj jaroj. Li strebis montri ĉiam aktualan, patriotisman heroecon de virino, ĉar la batala heroeco de viro estis por li io pli natura. „Graĵina” enhavas ankaŭ la politikan programon ne permesantan alianciĝi kun la malamiko, kaj historia, kruckavalira, kaj nuntempa, minacanta al Litovio kaj al Pollando, la cara Rusio.

„Praavoj”, la alia konsistparto de tiu volumo estas dramo vere revolucia. La popola solenaĵo duone kristana, duone pagana, omaĝe al mortintoj, apogas je kredo, ke vokitaj de partoprenantoj spiritoj venas kaj informas kian ilian helpon bezonas, por atingi la savon kaj ĉielon. Do, la poeto ne nur utiligas superstiĉojn tiom malestimataj de klasikuloj, sed ankaŭ povas krei la naciajn metodojn verki, ne apogante ilin je antikveco. La subtitolo „Poemoj” sugestas emon miksi la literaturajn specojn, spite al la klasikaj tendencoj. Ne dramo, ne tragedio, sed ĝuste — poemoj, vorto respektanta samtempe epikon, lirikon kaj dramecon, ŝajnas ĉi tie taŭga al la poeto. Ankaŭ fragmenteco de la verko (parto II kaj IV) sugestas, ke oni povas substreki nur certajn aferojn kaj preterpasi aliajn, ne nepre realigi la tuton de la komenco ĝis la fino.

La efemera amrilato kun la bela edzino de Kovna kuracisto, sinjorino Kowalska, ne donis al la juna instruisto veran feliĉon. Daŭre revenas kaj en la vivo

kaj en la literaturo (ekz. „Praavoj”, parto IV) rememoroj pri Marila. La lirikaĵo „Al M^{ickiewicz}” povas esti epilogo de ĉi tiu amo:

„For de l’ okuloj” — mi baldaŭ obeos,
„For el la koro” — obeos vin koro,
„For el memoro!” — ne! ordonon neos
Kaj surda estos je ĝi la memoro! [...]

En ĉiu temp’, en ĉiu loko, kie
Ni kune ludis aŭ plorante pasis,
Kun vi mi estos por ĉiam kaj ĉie,
Ĉar ĉie eron animan mi lasis”.

(trad. Leo Belmont, *Pola Esperantisto* 3/4, 1976)

Malbone sentas sin Mickiewicz en Kovno, enuas pro la malinteresa societo, malsanas elĉerpita post la intensa, porliteratura laboro. Studante kaj tradukante anglajn poetojn, precipe Byron, li atendas eksterlandan pasporton, sed vane. La nova katastrofo kunigas lin ree kun la amika rondo.

Caro Aleksandro la Unua post falo de Napoleono volis kvietigi Eŭropon, ne permesi al naciaj streboj, estingi tuj revoluciajn ardaĵojn pere de policaj metodoj. Malsekuraj ŝajnis al li diversaj organizitaj grupoj, malkaŝaj kaj sekretaj, kaj tutcerte polaj. Senatoro Novosilcov, unu el la kolonoj de tiu politiko, energie komencis batali kontraŭ pola lernejo kaj pola kulturo en landoj litovaj, rusaj kaj en la aneksita Varsovio. Jan Jankowski, timigita de polico, malkovras eston de la „Societo de Virtamantoj”, filo de „Societo de Sciencamantoj”. Mickiewicz kaj Zan estis arestitaj la 24an de oktobro 1823 kaj lokigitaj en la vilna klostro de bazilianoj, kun aliaj kolegoj. La juĝesploro estis malica, tendenca kaj barbara. Septembre 1824 oni verdiktis, ke Zan devas esti malliberigita ankoraŭ unu jaron, Czeczot kaj Suzin, duonon da jaro kaj dudek aliaj personoj ne rajtas plu, por ne „divstigi malprudentan naciismon” loĝi kaj labori en polaj gubernioj. La ministro pri klerigo povos uzi ilin al laboro en Rusio. Al deportitoj apartenis ankaŭ Adam Mickiewicz. En la rusa arestint-ĉaro li forlasis la amatan landon, por neniam al ĝi reveni.

Li loĝas laŭvice en Peterburgo, Odeso kaj Moskvo, en la lasta loko li laboris kiel oficisto en kancelario de princo Golicyn. Favore akceptita de rusaj literaturistoj, „amikoj-moskvanoj” kaj de poloj, loĝantaj en Rusio li povis vivi preskaŭ normale. Ian tempon li pensis pri edzeco kun Karolina Jaenisch, tre talenta posta poetino Pawłowa, kiu de ĉiuj amantoj lin virinoj komprenis lin la plej. En salono de princino Zinaida Wołkońska, Mickiewicz ekkonis Aleksandr Puŝkin, kun kiu — malgraŭ diversaj poezi-plaĉoj kaj realigoj — sukcesis enamikiĝi.

En Moskvo Adam Mickiewicz eldonis du ciklojn de sonetoj verkitaĵoj en Odeso (1826). La unua, nomata sonetoj erotikaj, faritaj majstre kaj memironie estas rikolto de amaĵoj kaj amuzaĵoj de ne tro ordigita vivo en Rusio. La dua, „Kromeaj sonetoj”, estis ofendo de varsoviaj klasikuloj. La travivaĵoj dum vojaĝo tra maro, montoj kaj stepoj aperas antaŭ okuloj de la leganto kiel grandiozaj bildoj, klaraj kaj akraj laŭ la desegnaĵo, buntaj kaj subtilaj laŭ koloroj de la bona akvarelo. Ekzotika, muzulmana mondo kaj interesiĝo pri oriento igis enkondukon en ĉi-ciklon multe da ne aplikataj ĝis nun efektoj, kiel la tata vortprovizo kaj ĉenegoj de la grandiozaj metaforoj, karakterizaj por la orienta liriko. Oni povas konstati, ke la aŭtoro ne eraris, opiniante ke li kreis etan majstroverkon, kiu daŭros dum jarcentoj.

La sekvonta poezia romano „Konrad Wallenrod” (1828) estas kaj pruvo de la romantika amo al la pasintaj jaroj kaj granda simbolo de la nuntempo. Por savi la patrolandon juna litovo fariĝas kruckavaliro kaj Granda Majstro de la Ordeno. Mallerte gvidante la militon li igas falon de la malamiko. La grava fragmento de la poemo „Kanto de Wajdelota” estas manifesto, inspiranta la batalon pri la plej esencaj valoroj de la nacia vivo, ĝia historia tradicio kaj la venonta disvolviĝo. La baza kondiĉo de ĉio-ĉi estas memkompreneble la libereco.

Tri versaĵoj de la sama tempo-periodo valoras ankaŭ por la nuntempa leganto, koncize planitaj kaj plenaj de humoro baladoj „Embasko” kaj „Tri Budrisoj” kaj dinamika, impeta, ĝojanta pro la propra, soleca forto „Farys”.

Maje en 1929, Mickiewicz adiaŭinte geamikojn forveturas de Moskvo. Tra Berlino, Dreseno, Prago, Weimar (kie li konatiĝis kun Goethe), svisaj Alpoj, li atingas Italion. Vizitante kelkajn italajn urbojn la poeto ekloĝis en Romo. Tie li travivas la laŭvican amon al Ewa Henrietta Ankwitz. La nupta fino ne eblis, ĉar grafoj Ankwitz ne opiniis lin inda eniri al la familio. En la jaro 1830 naskiĝas lirikaĵo „Al patrino polino” — himno de la subtera, patriotisma konspiro, omaĝo al sennomaj herooj, turmentataj kaj mortigataj de la kara reĝimo.

Pro sciigo pri la novembra ribelo en Pollando (1830) Mickiewicz veturas al Parizo senefike provante ricevi francan helpon por ĝi. Poste li atingas ĉirkaŭaĵon de Poznano, de kie li ne sukcesis trans la limo inter du aneksitaj teritorioj traigi al Varsovio.

La jaro 1832 abundas en gravaj okazintaĵoj. La poeto venas al Parizo, kie suferas kun aliaj polaj elmigrintoj la kontrolon de la franca polico. Intense li laboras sur kampo de literaturo, verkas dramon „Praavoj parto III”, kelkajn versaĵojn pri historiaj kaj imagitaj polaj herooj kaj prozan verkon „Libregoj de polaj nacio kaj pilgrimeco”, provon montri polajn elmigrintojn kiel avangardon de bataloj pri la universala libereco. Li komencas verki epopeon „Sinjoro Tadeo”. En „Praavoj parto III” pro la loza konstruo la poeto povis kunigi dek-

kelkajn bildojn realismajn kaj fantaziajn. La realismaj scenoj akuzas carismon pri krueleco, turmentanta senkulpojn, eĉ junulojn kaj infanojn. Scenoj fantaziaj montras elstaran unuopulon, baraktantan inter orgojlo kaj humilo, antaŭ ol li komprenos nepron rezigni de la propra individueco por servi al la aferoj de aro da homoj.

En la jaro 1834 Adam Mickiewicz finas vastan kaj komplikigitan epopeon „Sinjoro Tadeo” apogitan je la duobla tradicio — epiko de Homer kaj angla, romantika romano de Walter Scott. „Sinjoro Tadeo” montras al ni vivantan kaj klaran galerion de portretoj de multaj herooj kaj heroinoj, forte diferencigitaj, priskribitaj serioze aŭ humore. La imago de la aŭtoro konstruas riĉan bildon de la kvietaj, vilaĝa vivo, kiun historio (momento de trompa espero reatingi la nacian liberon helpe de Napoleono, en jaroj 1811 kaj 1812) transformas en ĉenon de esencaj okazintaĵoj ŝanĝantan konscion de ĉiuj herooj. Do „Sinjoro Tadeo” estas poezia enciklopedio de la malnovpola ĉiutaga vivo, de la eksa, nobela moro. La memoro de la poeto fidele konservis milojn da etaj realaĵoj kaj detaloj, aspekton de konstruaĵoj kaj vestoj, guston de manĝaĵoj, ĉiutagajn aferojn kaj distrojn. La grandioza fono de epopeo, bildoj de la litova naturo, sovaĝa kaj kultivita, priskribata tage kaj nokte formas vere majstran atingon, kunigantan tradiciajn kaj novajn metodojn verki. La nobla simpleco de la epopeo, bonega lingvaĵo ornamita per apartecoj de la lingvo loka kaj korekta skemo ritme–rima (13–silabaĵo kun la lertaj, paraj rimoj) profundigas plezuron legi ĉi tiun eksterordinaran verkon. Multfoje uzita vorto „la lasta” montras nostalgion de la poeto post la mondo senrevene perdita kaj lian konscion, ke ĉi-procezo estas neinvertigebla.

Preterlasis mi, birdo de flugo malalta,
Regionon de tondroj kaj pluvo senhalta,
Kaj mi serĉis serenon de aĝo infana,
Kaj mi serĉis trankvilon de hejmo kabana...
[...]

Al ni, en mondo gastoj, nepetita speco,
En la tuta nuneco, tuta estonteco,
Restis jam sole unu lando de konsolo,
Kiu hodiaŭ havas feliĉon por polo:
Lando de l' infaneco! restos por ĉiamo,
Sankta kaj pura, kiel unua ekamo,
Per eraroj-memoro neniam skuite,
Per esperiluzio ne subefosite,
Kaj per okazantaĵoj–torent' ne ŝanĝite.

(„Sinjoro Tadeo”, *Epilogo*, trad. Antoni Grabowski, Varsovio 1986)

La 22an de julio 1834 Adam Mickiewicz edziĝas kun Celina Szymanowska, filiono de la elstara pola pianistino Maria, kiun li ekkonis ankoraŭ en Rusio. Venas jaroj de malriĉeco, batalo pri modestaj subsidioj, de nefacila kontraŭstaro al la psika malsano de la edzino. La poeto verkas franclingve du dramojn, sed neniu franca teatro emas ilin prezenti. Mickiewicz agas kiel instruisto kaj lekcianto en Svisio kaj Parizo.

Aŭtune 1841 fondinto de la religia–mistika sekto, polo el Litovio Andrzej Towiański, disvastiganta siajn ideojn je okcidento de Eŭropo sanigas Celinan, pro kio forte influas al Adam Mickiewicz. La poeto, kiu ĉiam interesiĝas pri aferoj de religio (kion pruvas multaj poemoj kaj fragmentoj de dramoj), senhezite ekfidis al la profeto, kiu lanĉis la spiritan memperfektigon kaj intensigon de la religia vivo, post kio venos gravaj ŝanĝoj en historio de la homaro. Komence ravita de personeco de Towiański, Mickiewicz finfine rimarkis lian indiferecon por la liberec–batalo kaj ŝiris rilatojn kun li en la jaro 1847.

Towiański tre malprofite influis al vivo de la parizaj elmigrintoj kaj bremsis poezian kaj sciancan agadojn de Mickiewicz. De la revolucia jaro 1848 ĝis fino de la vivo, la poeto gvidas diversdirektan, politikan agadon volante servi al liberigo de ĉiuj nacioj kaj de Pollando.

Marte 1855 mortas Celina Mickiewicz, postlasante ses infanojn. Septembre Adam Mickiewicz veturas al Konstantinopolo por organizi kun Michał Czajkowski (Sadyk Paŝa) la polan, orientan legionon kontraŭ la cara reĝimo. Forte kontraŭstaris al tio Władysław Zamojski kaj reakciaj rondoj de elmigrintoj. La 26an de novembro 1855 Adam Mickiewicz mortis. Oni supozis la venenigon, sed pli verŝajna estis la manĝo–veneniĝo en malfavora klimato. La 21an de januaro 1856 korpo de la poeto ekripozis sur la tombejo Montmorency en Parizo. La 4an de aŭgusto 1890 nekalkulebla kvanto da partoprenantoj akompanis la ĉerkon de Adam Mickiewicz dum la landa entombigo. Oni fiksas ĝin en subteraĵo de la Vavela Katedralo en Krakovo.

Kaj oni devas preparoli ankaŭ la lastan, elstaran verkon de la granda poeto.

En la jaro 1834 en Parizo aperis „Sinjoro Tadeo”, eminenta epopeo de Adam Mickiewicz, la lasta en vico de la vastaj verkoj de poeto, post kiu li decidis ne verki plu. Tiun decidon kaŭzis ne la elĉerpiĝo de liaj eblecoj krei, sed la morala emo okupiĝi pri aferoj de la sklavita patrolando. Junie, en la jaro 1839 Mickiewicz translokiĝis de Parizo al Laŭzano en Svisio, pro la informo, ke en laŭzana universitato vakas loko de profesoro pri la roma literaturo. Oktobre oni nomumis lin eksterordinara profesoro kaj baldaŭ la ordinara. La 12an de oktobro li komencis lekcii. Lia scienca kaj didaktika agado estis tre alte pritaksita de la universitataj aŭtoritatoj. En jaroj 1839–40 la poeto ĉesis muti kaj revenis al la arto de la vorto, por krei ciklon de la laŭzanaj kritikajoj, astestantaj pri la novaj por li senaj asocioj kaj metodoj apliki poezian bildon.

La artaj streboj de romantikismo lanĉis liberecon de la poezia elparolo,

subjektivecon respektantan nur personecon de la aŭtoro, ekster reguloj kaj modeloj verki. Nenio do mirinda, ke malaperis observataj de klasikuloj striktaj limoj de la literaturaj genroj. En verkoj de romantikuloj miksiĝas epopeo, dramo, liriko. Lozigitaj komponarto de la elstaraj verkoj de Mickiewicz ankaŭ proponas en dramoj, poeziaj rakontoj kaj epopeo fragmentojn de la plej pura, kortuŝa aŭ inspira liriko. Des pli valoras kelkaj rimarkoj pri liriko en lirikaĵoj.

La poezia teksto povas ostente montri sian poeziecon, apliki ĝin per la rafinita leksiko, arigo de la metaforoj, komplikigo de la sintakso. Tiajn rimedojn ni povas rimarki en fruaj lirikaĵoj de Mickiewicz kaj precipe en „Krimaj sonetoj” (1826):

Kliniĝas la arbaro, ŝutas el maj-haro,
Kvazaŭ el rozario de l' kalif' grenatojn.

(Alŝuta tage)

La poezia teksto povas ankaŭ sian poeziecon maski. Ĝi povas imiti simplan elparolon, servantan por transdoni informon. Ligoj inter vortoj estas tiam proksimaj al uzado de la ĝenerala lingvo.

Super akv' granda kaj pura
Staris en vicoj rokegoj,
Kaj akvo per fac' polura
Kopiis formojn iliajn.

(La laŭzanaj lirikaĵoj,
Super akv' granda kaj pura...)

Tian ĝuste poezi-arton prezentas la plej unuspeca poemo de Adam Mickiewicz, unu el la laŭzanaj lirikaĵoj „Versiĝis larmoj...”, en kiu la travivaĵo estas esprimita tiom ekzakte kaj tiom koncize. La poeto ploras pro la tuta, propra vivo traktata de perspektivo de la viraĝa malvenko. Jus en la matura aĝo, en la kvardeka jaro de sia vivo, li registris ĉi tiun viran ploron:

Versiĝis larmoj miaj puraj, pluraj
Sur infanecon belan, anĝelan,
Sur junecon dur-nukan, altflugan,
Kaj sur viraĝan malavantaĝon
Versiĝis larmoj miaj puraj, pluraj.¹

¹ La poemon kaj la restintajn fragmentojn tradukis Lidia Ligeza.

Mirinda estas la versfarada konstruo de la poemo, nek silaba, nek silab-sona, nek sona. Ĉi versaĵo estas farita ekster ĝenerale konata versfara sistemo. Sen la troigo oni povas konstati, ke ĝi konstituas malkovron de la novaj vojoj por la ritmo.

Tiu lirika majstro-verko povas trompi nin pro la ŝajne naiva simpleco. Ĝia novigado apogas je simpleco kaj majstreco tiom altgradaj, ke ni ĝin ne rimarkas! Ni ricevas impreson de la ordinara lingvo, sed fakte ĉi tiu lingvo avangarde atakas nin pro la kuraĝo de la imago: „Verŝiĝis larmoj sur la junecon”. Mickiewicz konstruas plastan bildon, en kiu la larmoj verŝiĝas sur la infanecon, sur la junecon, sur la viraĝon. La metaforo transformas abstrakton je konkretaj, imageblaj kaj nombreblaj jaroj en la vivo de la homo. La milda paralelismo de la enaj rimoj „puraj, pluraj”, „belan, anĝelan” estis impete disbatita pro la unuopa kaj unuvorta pritakso de la viraĝo. Tiu kontrasto donas la fortan, sentan efekton. Se idealo de la moderna poezio estas maksimumo de la lirika enhavo en minimumo da vortoj — ĉi versaĵo tutcerte plenumas tiun kondiĉon.

Preciza elekto de la adjektivoj „bela, anĝela”, „dur-nuka, alt-fluga” kvazaŭ plilongigas la poemon. Nur du adjektivoj devis karakterizi kelkjarajn partojn de la vivo. La senduba sukceso de la poeto apogas je la fakto, ke nenio en ĉi kunmeto al ni mankas. La tempo de la infaneco aŭ vere, aŭ en la idealigema memoro estis tiom bela, ke eĉ anĝela.

La tempon de juneco la poeto priskribas denove nur per du adjektivoj, sed esencaj por la ambicia junulo, substrekante sendependon, neglekton por aŭtoritatoj kaj idealismon: „dur-nuka, altfluga”. La verko ĉion unuigas — signifon kun sono, emociion kun priskribo, senton de malkvieto kaj samtempe kvieto, ravas per la poezio integra.

Finfine la demando, ĉu signifo de ĉi poemo estas nur pesimisma? Kvankam la plenaĝulo priploras malvenkojn kaj malavantaĝojn ĉefe de la vira aĝo, tamen liaj larmoj estas puraj kaj abundaj. En multaj simbolaj sistemoj regas konvinko, ke la organismaj fluaĵoj, al kiuj apartenas ankaŭ larmoj, havas pozitivan signifon. Ili kuniĝas en interpretoj kun akvo kaj roso. Puriga kaj saniga forto de la akvo, precipe pura, viva, rolas en mitoj, legendoj, fabeloj kaj literaturaĵoj. Ekzemple en la angla literaturo roso kaj larmoj elpaŝas egalvalore: „La nokto se la roso, kiu tra vangoj miaj fluas” (Ŝekspiro); „Ho! Kiam surtere jam neniu ekploros krom roso de la kampoj niaj verdaj” (Lordo Chesterfield).

Larmoj plifortigitaj per nocio „puraj” simbolas purigon kaj liberigon. Do oni rajtas supozi, ke plure priplorita vivo de la poeto ne finas senespere, ke ĝi ankoraŭ povas alporti al li absolvon post la eraroj kaj eblecon konsenti kun si mem.



En la intertempo de la du mondmilitoj

Du polaj anoj de la Lingva Komitato en Parizo

La unua pri kiu temas estas Salomon Kornfeld, kiu, post Esperantigo de sia nomo estas pli konata de la esperantistoj kiel Salo Grenkamp, kaj — foje — Grenkamp-Kornfeld. En la kadro de tiu ĉi artikolo por li mi uzos la siglon GK.

La dua, pri kiu mi volas paroli, estas Jan Kostecki, JK.

„Parizo! Tuj ekbatas la koro, kiam oni eldiras tiun vorton” — skribis JK en „Pola Esperantisto” de oktobro 1928.

Preskaŭ samaĝaj kaj allogitaj de la vivo en Parizo ili tie instaligis en la unuaj jaroj post la unua mondmilito, ni diru komence de la 1920aj jaroj, Senriproĉe bone ili regis la francan lingvon, sed konservis la polan naciecon.

Fizike perforte mi ilin renkontis unu-an fojon en la tempo de „la Verda Kato”. La esperantista kabareto, en kiu plej emnente ĉefrolis Raymond Schwartz unuafoje „miaŭis” la 15an de decembro 1920. Raymond Schwartz ĝin forlasis kaj publikigis sian „Verdkata Testamento” en 1926. En 1927 la VK ne plu „miaŭis” por forvojaĝo de Paul Echard en Grekion.

Ĉar ĝi estis tute dislokita, post la milito la tasko de Th. Cart, prezidanto de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio, estis reorganizi la lingvan institucion. Sur la lingva tereno li devis defendi la fidelan sintenadon de la Akademio rilate al la zamenhofa sistemo por traduko de landno-

moj forigante alian solvon, la uzon de la finaĵo „io”. En paĝoj de „Pola Esperantisto” (PE) li trovis bonan advokaton en la persono de Jan Kostecki.

Al la restintaj kaj freŝe elektitaj membroj, Cart prezentis novajn diverslandajn kandidatojn por la Lingva Komitato, inter kiuj GK kaj JK. Ili estis elektitaj en 1926, sed la letero-cirkulero de Cart diris: „...por laŭeble egaligi la nombron de la ĉiujare elirantaj membroj, la Estraro konsideru elektitaj por 8 jaroj anstataŭ 9, tiujn, kiuj ricevos malpli da voĉoj. En 1925 nur tri novaj anoj eniris la LK-on”. La limdato por la voĉdono estis la 31a de majo 1926. GK kaj JK — kaj aliaj — estis elektitaj en 1926, sed konsiderataj kiel elektitaj en 1925 tiel, ke la jaro de estonta reelektado estis: $1925 + 9$ (tempodaŭro de la mandato) = 1934. Cetere, siatempe, GK kaj JK estis reelektitaj.

Danke al la letero-cirkulero de Cart ni scias, ke:

— GK tiam loĝanta en Parizo, estis ĵurnalisto. Ne nur li estis kunlaboranto de la plej ĉefaj esperantistaj gazetoj, eldonisto kaj verkisto — li multe faris tiu-ĉi kampe — sed ankaŭ li kunlaboris en naciaj gazetoj. Krom la pola kaj esperanta lingvoj li scipovis la francan, germanan, latinan kaj grekan.

— JK estis ĵurnalisto. Li liĝis en Parizo, sed havis konstantan adreson en Varsovio. Liaj adresoj ofte ŝanĝiĝis ambaŭurbe. Konstanta kunlaboranto de „Pola Esperantisto” estis la sola al li rekonita merito

por esti LKK-ano. Li scipovis la francan, rusan, anglan kaj iom germanan — memkompreneble krom la polan kaj esperantan lingvojn. Li esperantistiĝis en 1908.

Pludaŭris la amikaj rilatoj inter Raymond Schwartz kaj JK.

En „La stranga butikoj” (1931), laŭ sia neanstataŭebla stilo, R. Schwartz dediĉis „Al mia bona amiko, Jan Kostecki” sian „Vi resaniĝis!” kaj tiel portretis lin kiel akvotrinkulo! Estis la tempo, kiam ambaŭ projektis eldoni esperantan almanakon, „La Petardo”, bedaŭrinde sen sekvo.

Petita de R. Schwartz redaktoro de „La gazeto de la XXIV” (Universala Kongreso de Esperanto en Parizo, en 1932), JK publikigis en ĝi artikolon „Parizo por komencantoj”. Ĝi estas humurtona kaj estas aparte amuza noti la ŝajne kontraŭalkoholan trinkemon de la aŭtoro, kiam li skribas: „vi evitos aperitivojn kaj likvorojn, kiuj, se ili intensigas vian gajecon, samtempe tamen malgrandigas vian perceptkapablon”. Tiu ĉi aludo de JK fakte estas repliko al R. Schwartz pri lia satira, sed amika, teksto en „La stranga butikoj”. La rimarkon R. Schwartz ne lasis senresponda. Ja, post la repliko de JK, R. Schwartz aldonis: „(Dankon! — La Red.)”. Kiam temas pri ŝvarcaĵoj oni devas legi „interlinie”, laŭ lia speco spico.

Povas esti, ke JK trinkis nur akvon, sed li estis fumanto. Sur la diversaj fotoj kiujn mi vidis, ĉiam tre elegante vestita, parizanece, li tenas cigaredon en la mano eĉ sur arta portreto de li en Varsovio.

Same kiel JK, GK plej ofte vivis en Parizo, kunule de Angèle Fallot, sed havis konstantan adreson en Pollando, en Jaśło, kie sidejis lia eldonejo „Esperantista voĉo”. En tiu urbo loĝis lia patro, Vilhelmo, vicurbestro, prezidanto de multaj bonfaraj societoj kaj de la izraelida komunumo. Lia patro mortis en la epoko de la varsovia Universala Kongreso de

1937. Preskaŭ la tuta urbanaro sekvis lian ĉerkon.

Notindas, ke GK ne partoprenis en la varsovia UK de 1937. Eĉ al ĝi li ne aliĝis.

Ĉeestanta en la kongresa kunveno de la Lingva Komitato, JK „petas pri klarigoj koncerne la noton pri la Oficiala Vortaro de Esperanto de S-ro Grenkamp-Kornfeld”. Paul Nyle/n, akademiano, klarigas, ke : „li ekzamenis la verkon de GK kaj konstatas, ke ĝi estas plenplena de eraroj. Krom tio estas sur ĝi speciala noto, ke neniu rajtas represii ion ajn” (el la protokolo de la kongresa kunveno de la LK).

Minimume dirite, pro la formo, la interveno de JK dum ne ĉeestas GK signifas ian antagonismon inter ili, jam de jaroj.

Komence de 1930 du notindaj faktoj okazis en la esperantista vivo de Jan Kostecki:

— en la januara numero de „Pola Esperantisto” aperis longa pollingva rebato de li al Antoni Troszyński, diakono de la porpastra seminariejo en Pelplin (Pomeranio), kiu plendis aliloke, ke la pola movado estas en la manoj de sektistoj, framasonoj kaj komunistoj kun periodaĵa ligilo redaktita de judoj;

— li aliĝis al la framasona loĝio „Esperanto” en Parizo.

Ekde tiam:

— A. Troszyński malaperis de la jarlibro de IKUE

— JK ne plu estis kunlaboranto de „Pola Esperantisto”.

Laŭokaza kunlaboranto, jam de 1929, Grenkamp iĝis konstanta kunlaboranto de „Pola Esperantisto” anstataŭe de JK aldone de tio, ke li jam estis ĝia reprezentanto en Parizo.

Ĉio ĉi ne estas fakto de hazardo.

Mi notis plian kulisan rivalecon inter JK kaj GK je la morto de Th. Cart:

— en la januara (1931) numero de PE aperis omaĝa artikolo de GK rememore al Cart;

— al la kunvenantaj anoj de la LKK de la 23a UK en Krakovo (aŭgusto 1931) dum ĉeestis nek GK, nek JK, ĉi lasta perlete-re sugestis kolekti monon por enmurigi memortabulon sur la domo, kie loĝis kaj mortis Cart en Parizo.

Kaj GK kaj JK volis havi „sian” personan omaĝon al Cart.

Vicprezidanto de la organiza komitato de la krakova kongreso de 1931, Edward Kostecki, inĝeniero, kun edzino Jadwiga, jam partoprenis en la krakova Universala Kongreso de 1912. Ĉu li estis parenco de Jan Kostecki? Mi ne scias.

Kiel dirite, en 1930 JK aliĝis al la sekreta framasona loĝio „Esperanto” en Parizo. En 1932 li estis iniciita, sed fine demisiis. Danke al tiu aliĝo ni scias, ke li naskiĝis en Pollando (kie?!) en 1893, loĝis en Parizo kaj estis literaturisto.

Dumtempe, en la 1930aj jaroj, GK estis oficiala reprezentanto de la ambasadoro de Pollando, okaze de pluraj sinsekvaj jarkongresoj de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto (SFPE).

Kasisto de la Sindikata Unuiĝo de Polaj Ĵurnalistoj en Francio, GK unuarange kunlaboris en la aranĝo de popla vespero la 21an de februaro 1937, antaŭvide al la varsovia jubilea Universala Kongreso. En plenplena amfiteatro de Sorbono, en Parizo, ĉeestis la ambasadoro.

Tiuj ĉi oficialaj rilatoj de GK ne estas fremdaj al la fakto, ke la Oficiala Ĵurnalo de la Franca Respubliko kun dato de la 9a de aŭgusto 1939 kaj deirato de la dekreto de la 29a de julio, Grenkamp-Kornfeld (Jan-Jerzy) — tiel — de pola nacioco, korespondanto de polaj ĵurnaloj en Parizo, iĝis kavaliro de la plej alta franca ordeno Honora Legio, same kiel D-ro Zamenhof en 1905.

Ni scias aliflanke, ke li naskiĝis en Gorlice la unuan de julio 1896.

Ege tragika estis lia morto, la 22an de julio 1943, en la fifama ekstremejo de Na-

tzwiller-Stuthof (Elzaco) sur parto de la franca teritorio aneksita de la nazia Germanio.

Nur de unu semajno li estis tie, suferis nedireblajn torturojn, kaj — kiel multaj aliaj — devis malaperi sen lasi spuron pro tio, ke li estis klasita NN („Nacht und Nebel” = Nokto kaj Nebulo). Tio ĉi signifas, ke li estis sovaĝe murdita ne pro etna deveno juda, sed pro politika kialo. Li tradukis en Esperanton kaj eldonis la verkon de C. Smogorzewski, prezidanto de la Sindikata Unuiĝo de Polaj Ĵurnalistoj en Francio, „Pol-Pomeranio”. Tion ĉi la nazioj pagigis al li abomene malhumanece.

Depost la varsovia Universala Kongreso de 1937 mi perdis la spuron de Jan Kostecki krom tio, ke — laŭ la jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio por 1938 (anoncita en „La Praktiko” de januaro 1939) — lia adreso estis ĉe Międzyzlesie apud Otwock, domo de J. Fluks. En la enkonduka parto de la koncerna jarlibro, parto pri „administra funkciado”, JRG Isbrucker, prezidanto, mencias, ke sendaĵoj al kvar LK-anoj ĝis meze de 1938 revenis al li kiel nelivereblaj. Ne citita estas la nomo de JK: la sendaĵoj trafis lian adreson.

Dum la dua mondmilito la LK perdis diverskiale proksimume la duonon de siaj membroj. Inter ili estis Jan Kostecki.

J.A.

P.S.

Dankon al Zofia Banet-Fornalowa, kiu bonvolis analizi por mi, kio por mi ne alirebla, ĉar en la pola lingvo: la lastan artikolon de JK en PE, „Esperanto a sekcjarze”.

Mi kaptas la okazon por saluti ŝiajn prihistoriajn esplorojn. Tiuteme ŝi skribas kun serioza kaj skrupula profesiiismo, ne romanece, sed verfakte.

Ĉu internacie inda kaj interesa?

Esperanto–kulturo el tutmonda perspektivo

1. Enkonduko

Estas tre malfacile diskuti ion, kio okazis antaŭ dudek jaroj. Parte, ĉar ankoraŭ ne pasis sufiĉe da tempo, por ke ni vidu la okazaĵojn el historia perspektivo, kaj parte, ĉar mankas neŭtralaj kaj sciencaj analizoj pri tio, kio okazis kaj pri ĝiaj konsekvencoj. Al tio aldoniĝas la fakto, ke mi mem ne ĉeestis, kaj ne povas juĝi pri la okazaĵoj krom surbaze de dokumentoj, kreitaj dume kaj poste.

Miaj vidpunktoj do baziĝas sur skribaj dokumentoj, mia sperto kiel uzanto kaj aganto de Esperanto dum pli ol 15 jaroj kaj mia sciencista eduko. Mian pensadon influas ankaŭ loĝado ekster okcidenta Eŭropo, ĉefe en orienta Eŭropo kaj Azio, kaj mia laboro kiel redaktoro de *Kontakto*, kiu ĉiujare ricevas preskaŭ mil paperajn leterojn kaj plurajn milojn da retmesaĝoj el pli ol 90 landoj. Sed finfine tio, kion mi diros ĉi tie, mi diros ne kiel redaktoro, nek kiel sciencisto, sed kiel kulturaganto kaj kulturproduktanto.

* Kun afbla permeso de la aŭtorino. La teksto estas de la jaro 2000, kaj troveblas ekde tiam en la reto (<http://sabarashun.tripod.com>). La familia nomo de la aŭtorino nuntempe estas Shun.

1.1 Celo

La celo de tiu ĉi prelego estas meti la Esperanto–kulturon en vastan, tutmondan perspektivon, por vidi ĝiajn dimensiojn, karakterizaĵojn, merkaton kaj evoluon. Mi volas starigi ankaŭ la demandon pri originaleco kaj valoro de Esperanto–kulturo por la mondo kaj por Esperantujo, kaj laste diskuti iom pri kulturpolitiko — ĉu la Esperanto–kulturo bezonas propran kulturpolitikon?

Mi uzos la vorton *Esperantujo* por signi ĉiujn parolantojn kaj uzantojn de la lingvo Esperanto kaj la ligita kun ĝi kulturo kaj servoj, sendepende de tio, ĉu la uzantoj konceptas sin movadanoj, komunumanoj aŭ io alia. Mi preferas uzi tiun vorton, ĉar mi vidas, ke la diskuto pri movado kontraŭ komunumo, kiu ekzistas ekde la Universala Kongreso en Bulonjo–sur–Maro (1905) estas tre limigita kaj ne respiegulas la realecon de la Esperanto–parolantoj. Eble por klareco indas komenti mallonge pri la diskuto pri–Esperanta, daŭranta de pli ol jarcento. Tiun diskuton partoprenis homoj, kiujn mi nomus ĉi tie ĝenerale per la vorto *elito*.

1.2 Aspektoj de la diskuto

La plej frapa karakterizaĵo de la diskutoj pri lingvo Esperanto, ĝia rolo en la mondo kaj la kulturo ligita al ĝi, estas ke

ili ŝajne baziĝas sur iaspeca antaŭsupozo, ke Esperanto ne rajtas ekzisti, kaj ke uzanto devas trovi kialojn por pravigi ĝian ekziston aŭ la propran ligiĝon al ĝi en la okuloj de la t. n. „ekstera mondo”.

Mi diru tuj, ke klaras por ajna homo, kiu rigardas al la mondo per malfermitaj okuloj, ke la lingvo Esperanto kaj Esperanto–kulturo ekzistas. Kial do nei tion, aŭ aliflanke, serĉi pravigojn, eĉ identecon? Al kio aŭ kiu utilas tiuj pravigoj?

La okcidenteŭropa pensmaniero kaj tiu de ĝia ido, usona, tendencas rigardi ĉion, kio ne eniras la propran unudimensian, „unuecan” mondpercepton kiel minacon, kaj ĝi provas kontroli, subigi, ridindigi aŭ nei ties valorojn kaj originalecon. Eble estas heredado de la okcidentkristana tradicio, en kiu ne nur la Inkvizicio provis kontroli la pensadon dum la lastaj jarcentoj. Eble temas pri manko de memfido rilate al la propraj kulturo kaj memo, aŭ manko de informoj kaj spertoj pri la mondo ekster la propra putto. Dependas de la fakulo, kiu analizas, kiajn rezultojn li aŭ ŝi trovas. Fakto tamen restas, kiel montris en sia fama verko *Orientalism* (de 1978) esploristo *Edward Said*, ke temas pri karakterizaĵo de okcidenteŭropa kaj nordamerika mondperceptoj kaj politiko.

Tiu ĉi — mi nomos ĝin laŭ *Said okcidentisma* — mondpercepto regas ankaŭ en la diskutoj inter Esperanto–uzantoj. Ne malmultas, kiel ni ĉiuj scias, kvereloj kaj disputoj pri identeco kaj karaktero de Esperantujo kaj pri nombro de *la butonoj en la jakso de Zamenhof*, kiel kantas *Gianfranco Molle* sur sia kasedo *Kontakto*. Sed mankas fakaj esploroj, mankas tutmonda diskuto. Kion oni do diru sen perdi kredindecon? Sur kio oni bazu sin?

Sen seriozaj studoj kaj sen envolvigo de uzantoj el aliaj mondopartoj — kio postulus sufiĉe grandan internan ŝanĝon en la potencostrukturoj de Esperantujo — la diskuto restos vana, inerta kaj im-

potenta. Ĝi plu restos du–polusa, malrealisma, centrita je sia propra umbiliko kaj ne laste firme eŭrop– kaj nordamerikcentrisma kaptito. Ĉu tiuj diskutoj vere portas nin al io? Ĉu utilas?

Miaj spertoj montras, ke la diskutoj pri noblaj celoj, finvenkismo kaj tiel plu neniel interesas, se eĉ entute percepteblas, por homoj ekster la okcidenta, kristana tradicio. Kiel uzi Esperanton praktike, estas la pli ofta demando. La sola komuna afero ŝajnas esti la plendoj, ke ne sufiĉas la uzado kaj kvalito de Esperanto–aplikado en kulturo, scienco, tekniko kaj aliaj fakoj. Tio jam donas bazon por diskuto. Mi esperas, ke en la estonteco la diskutoj estu vere tutmondaj, larĝaj kaj liberaj. *Por ke lingvo estu internacia*, ja diris L. L. Zamenhof, *ne sufiĉas nomi ĝin tia*.

2. La diskuto kaj la Manifesto

2.1 Demandoj

La raŭma manifesto laŭ mi estas tipa reprezentanto de pluraj problemaj punktoj, kiujn mi jam menciis antaŭe. Krome, aldoniĝas terminologiaj demandoj (ekzemple pri *egoo* kaj *superegoo*, krizo de identeco — de kie venas tiuj konceptoj? Kion ili signifas?) kaj ankaŭ la demando pri ĝia aktualeco por la nuna situacio, ankaŭ temo por hodiaŭ. La manifesto evidente estas politika dokumento posedanta ties karakteron kaj vortprovizon. Kaj la demandoj ne estas novaj, ekzemple ĉu Esperanto–kulturo signifu ion por la ekstero, aŭ nur por ni mem, ĉu ni havas ion por prezenti aŭ kiel ni povas alproksimigi la mondon per Esperanto–kulturo.

Mi vidas la manifeston ĉefe kiel historian dokumenton kun certa signifo, ĉar en ĝi esprimiĝas koncentrite demandoj, problemoj kaj solvoj karakterizantaj la epokon, en kiu ĝi verkiĝis. La mondo ŝanĝiĝis draste en 1989 kaj la ideoj pri-

diskutitaj en Raŭmo jam plejparte perdis sian aktualecon. Ankaŭ por Esperantujo. Dum la du jardekoj post Raŭmo Esperantujo ŝanĝiĝis, kaj restas por la historiistoj malkovri, ĉu la manifesto kontribuis al tio aŭ ne, aŭ ĉu ĝi estis esprimiĝo de pensofluo, kiuj jam antaŭe ekzistis kaj ekflorus ankaŭ sen la manifesto.

2.2 La limoj de libereco kaj identeco

Lige al la manifesto kaj la posta debato (aŭ manko de debato) mi ŝatus levi gravan demandon. En la manifesto eksplicite temas pri iu fiksa grupo, kies opinio la dokumento esprimas. Tamen, tro regule aperas provoj difini la kialojn kaj kielojn de ĉies Esperanto-uzado. Ne maloftas provoj eĉ difini kion oni, por esti „samideano”, pensu pri Esperanto kaj ĝia uzado. Alternativojn oni atakas aŭ prisilentas. Malmultas esceptoj — nome libera, trankvila kaj interesa opinio-interŝanĝo. Kial?

Totalismo kaj orgojlo estas la vortoj, kiuj plej trafe esprimas la (mal)diskuton. Neniu povas difini — des malpli sen fari seriozan kaj profundan enketon, se eĉ tiam — la kialojn kaj kielojn de Esperanto-uzado tutmonda, kaj des malpli iu ajn havas la rajton difini kiel oni pensu. Sed temas ĉi tie pri potenco, kaj pri potenco oni batalas tra la tuta mondo. Homoj estis persekutitaj diversloke pro tio ke ili parolis Esperanton. Kial do devas okazi persekutoj en Esperantujo, rilate al mal-sam-pensantoj, idistoj kaj aliaj?

Kiel mi jam diris, la kristana-okcident-eŭropa tradicio baziĝas sur iaspeca ideo pri unueco, ĉu fikcia, ĉu perceptata kiel realeco de la homoj vivantaj en tiu tradicio. Sed la hodiaŭa mondo ne plu estas unueca, nek unudimensia aŭ eĉ dudimensia — ĝi estas plurdimensia, kaj en la kazo de unu kaj sama homo ekzistas, kvan-

kam eble la homo mem ne konscias pri tio, pluraj samtempaj identecoj, dimensioj, limoj, kredoj ktp. Ili rajtas ekzisti paralele kaj samtempe, kvankam pluraj scioj tion ne akceptas pro diversaj kialoj.

Eble en 1980 estis necese, ke junaj Esperanto-uzantoj difinu sin mem kaj trovu por si identecon. Kaj ne nur en Esperantujo. Junularo en tiu tempo kaj dum la 80aj jaroj — tion mi mem atestis — serĉis vojojn por transiri la dividon de la mondo kaj trovi sian lokon inter kaj trans la politikaj limoj. Nun la mondo jam aspektas aliel. Oni ekagnoskas tutmondajn kulturojn, subkulturojn, identecojn kaj fenomenojn. La situacio estas do alia, kaj en multaj manieroj estas — ne nepre ĉie — hodiaŭ pli facile diri: mi parolas internacian lingvon, kaj mi havas identecon internacian, ol estis antaŭ 20 jaroj, kiam regis ideoj forte naciismaj kaj devigaj rilate al identeco.

Hodiaŭ identeco jam fariĝis plejparte privata afero. Kiel mi identigas min, estas mia afero. Same kiel neniu rajtas diri al mi kiel pensi, neniu rajtas diri kiel mi identigu min. Provoj inĝenieri la identecon de homoj rezultas en plej malbona kazo, kiel ni multe spertis dum la lasta jardeko, en sangoelverŝo.

2.3 La manifesto 20 jarojn poste

Estas tempo, ke Esperantujo ĝisdatiĝu al la jaro 2000. Ne plu estas la tempo de *nova mondordo*, ĉu ekonomia, ĉu lingva, ĉu kultura — tiuj ideoj mortis kun la malnova mondordo en 1989. Nun estas la tempo de *tutmondiĝo*, de diskutoj *pri nordo-sudo, oriento-okcidento, evolulandoj kaj riĉaj landoj, ekologio, potenco-kaj mon-divido de la mondo*, diferencoj en *vivnivelo, rajtoj* je ekspluatado de naturriĉaĵoj ktp. Rajtoj diversspecaj, ĉu homaj, ĉu lingvaj, ĉu bestaj aŭ infanaj.

La signifo de vortoj ankaŭ ŝanĝiĝis. Mi-

noritato estas forpuŝata de etno respektive *etna minoritato*, *diasporeco* fariĝis *tutmonda mobiligo* de laborfortoj aŭ mafieco, kaj la defio ne plu estas trovi lokon por internacia movado inter du blokoj. La defio estas sekvi kaj kontribui al la procezoj kaj evoluoj okazantaj tutmonde. Sed kion tio postulas de ni? Kaj kion ni postulas de la monda evoluo? Kion fakte ni volas?

Ekzistas pluraj respondoj al tio. Ekzistas tiom da opinioj kaj respondoj, kiom da kapoj. Demokratiiga kaj moderniga procezo en Esperantujo signifus, ke oni donu spacon al ĉies opinio, kaj ĉies vojo. Kaj ĉies respondo al la momentaj defioj. En ajna kazo, la Esperantuja trajno iros plu, eĉ se ne okazos disfalo de la enaj muroj. Kaj finfine, kial ne eblus simple ĝui, amuziĝi kaj uzi tion, kion Esperanto kaj la kulturo, movado kaj servoj ĉirkaŭ ĝi ofertas?

3. La rilato inter lingvo kaj kulturo

3.1 Rilatoj socio–lingvo–kulturo kaj kulturagantoj

Por paroli pri kulturo kaj lingvo en la speciala kunteksto, kiun ofertas internacia lingvo, ni devas unue difini, kio estas kulturo. Sen dronigi vin en etimologiaj kaj alispecaj klarigoj, mi ŝatus resumi diri, ke *kulturo estas fenomeno, kiun produktas socio*. Oni povas ankaŭ diri, ke kulturo estas *iaspeca esprimiĝo de socio*. Kial ekestas kulturo? Neniu sukcesis ĝis nun tion klare respondi. Restas do la fakto, ke kulturo ekzistas.

La rolo de lingvo en kulturo estas esenca. Sen lingvo ne ekzistas kulturo, sed ankaŭ ne ekzistas homa lingvo sen kulturo. La rilato inter kulturo, lingvo kaj socio fakte estas tre proksima: kiam ŝanĝiĝas unu, ŝanĝiĝas ankaŭ la alia, ĉu pro ekstera influo aŭ kontaktoj, ĉu pro interna evoluo. Luj argumentas, ke socio, kulturo

kaj lingvo estas diversaj aspektoj de la sama afero, nome homa vivo, kaj ne povas esti apartigataj. Tamen, gravas diri, ke ne lingvo difinas kulturon, sed la socio, en kiu kreiĝas la kulturo.

Kiuj faras kulturon? Homoj, kiuj kreas, kiuj produktas, kiuj vendas kreaĵojn, kiuj aĉetas kreaĵojn. Kaj homoj, kiuj aprezas, ĝuas, kritikas, abomenas, rimarkas tion, kion aliaj kreas. Kulturo, same kiel kulturagantoj ne dependas de geografia areo, nek ĉiam de tempo. Kulturagantoj povas vivi en ajna loko sed aparteni al iu specifa kulturo. Ekzemple *Elias Canetti*, *Josif Brodsky* kaj *Frédéric Chopin* vivis ekster la kulturoj kaj socioj, kiuj agnoskis ilin, kaj kiujn ili opiniis „siaj” kulturoj. Ankaŭ eblas agi en pluraj kulturoj samtempe, kaj eblas agi en diversaj lokoj por unu kulturo — ankaŭ tion samtempe. Ekzemplo de tio estas la armena kaj juda kulturoj, kaj nuntempe ankaŭ la amaskulturo.

Kiu kaj kio peras kulturon? Amaskomunikiloj, interreto, libroj, diskoj, eldonistoj, muzikeldonistoj kaj multaj aliaj. Kulturon oni povas peri trans lingvaj kaj aliaj limoj, kiel montras la ekzemplo de la amaskulturo. Ĉu tio do signifas, ke ekzistas, aŭ ekestas tutmonda kulturo? Kaj se jes, kiun rolon ludas Esperanto–kulturo en tio?

3.2 Internacia lingvo kaj kulturo

Antaŭ ol respondi al tio, ni eble demandu, kio estas Esperanto–kulturo. Mi difinus ĝin kiel kulturo, kiun kreas homoj influate — ĉu konscie aŭ ne, tio ne gravas — de la ideoj rilataj al la fenomeno Esperanto, aŭ la lingvo mem. Nome, tio estas ĉio, kion homo povas fari nur pro Esperanto, pro influo iaspeca de la fenomeno Esperanto, aŭ kiam homo perceptas sin mem aŭ aliaj perceptas ŝin kiel aganton aŭ anon de la kulturo Esperanta. Kiel ankaŭ aliaj kulturoj, la Esperanto–kulturo naskiĝas en sia socio, kiu konsi-

stas — same kiel aliaj socioj — el homoj kiuj iel ajn rilatas kun la fenomeno Esperanto, ĉu identigante sin kun iuj elementoj en ĝi, ĉu opiniante sin parto de komunumo, ĉu pro ajna alia kialo.

Esperanto–kulturon formas la socio, la homoj. La lingvo funkciis kiel instigilo por formiĝo de socio, kaj tiu socio kreas la kulturon produktante kaj konsumante ĝin. Evidente ekzistas bezono je ĝi, kaj pri tiu bezono mi parolos pli poste. Ofta demando estas, ĉu internacia lingvo — aŭ ĉu artefarita, laŭplaĉe — povas havi kulturon, kaj kia estu tiu kulturo? La ekzisto de Esperanto–kulturo montras, ke jes, internacia lingvo *havas* kulturon, kaj ke tiu kulturo estas propra, aŭ por uzi la lingvaĵojn jam tro eluzitan, *originala kaj valora*. Inverse eblas demandi, ĉu kulturo povas havi internacian lingvon. Ankaŭ tion la ekzisto de Esperanto respondas jese. Kaj ĉu tiam tiu kulturo estas internacia? Jes, se ĝiaj anoj kaj/aŭ la ekstera mondo perceptas ĝin tia. Ĉiam ekzistis kaj ekzistas internaciaj kulturoj — transnaciaj se oni volas — ĉar la ideo pri „nacio” estas relative nova en la homa historio.

4. Valoroj

4.1 Valorkrea procezo

Kiam oni parolas pri valoroj, necesas memori, ke pri gustoj nek indas, nek endas disputi. Homoj taksas kulturon diversmaniere. Pro personaj aŭ aliaj kialoj iuj konsideras aŭtoron altkvalita, dum aliaj konsideras lin aŭ ŝin neniulo. La plejparto de la homaro sur nia planedo mal multe pensas pri la t. n. *alta kulturo*, kaj la fina valorigado — tiu, kiun ni legas en gazetoj kaj aŭdas en televido aŭ radio — restas tasko de eta grupo da homoj, kiuj aŭ pro sia eduko, aŭ pro propra deziro moviĝas en tiu kampo.

Por ke kulturo videbla, ekzistu, necesas

ke iu ĝin pritaksu, donu al ĝi valoron. La pritakso povas kompreneble esti kritikego kontraŭ aŭ laŭdego por, sed la celo de la pritakso estas videbligo de tio, kion iu kreis. En socioj okazas — ofte ne tute travidebla por la individuo — interkonsento pri kiajn valorojn oni prenu, kio estas fama kaj alprenenda, kaj kio ne. Kio aperu en antologio, kio estu instruata en lernejoj, kio transiru al la venonta generacio? Surbaze de la interkonsenta rezulto, ies kreaĵo fariĝas famega, alies malaperas en la bibliotekaj ĝangaloj. En tiu procezo tiu, kiu havas multan monon kaj povas multe reklami, aŭ tiu, kiu kreis por si propran merkaton, ofte gajnas la famon kaj nuntempe ankaŭ la monon.

Sur tutmonda nivelo la interkonsento funkcias momente tiel, ke usona kaj okcidenteŭropa valorsistemoj pere de kulturproduktoj alpreniĝas kaj akceptiĝas, ĉar tie troviĝas la mono kaj la potenco. La demando nur estas, kiel oni kalkulas valorecon — ĉu per mono, ĉu per prestiĝo, ĉu per kvalito (kaj kiu diras, kio estas kvalita)? Ĉu per io alia? Ni eble vidu refoje pri la Esperanto–kulturo.

4.2 Valorigo en la Esperanto–kulturo

Ĉu ekzistas entute komunaj valoroj por la uzantoj de Esperanto, ilia socio kaj por Esperanto–kulturo? Ŝajnas, ke jes. Ĉar Esperanto–kulturo plu vivas, kaj plu evoluas. Sed kiaj ili estas? Neniu ĝis nun esploris, kaj mi ne havas klaran respondon al tio. La direkton mi tamen serĉus en la ideo bazo de la socio Esperanta, kaj en Esperantujo mem, kaj en la motivoj, kiuj trakuras la tutan Esperanto–kulturon, kaj ĉe la kultur–videbligantoj, la pritaksantoj de la Esperanto–kulturo. Sed nur post esploro pri la rilatoj, sintenoj kaj procezoj eblus diri, al kio tendencas la valorigoprocezo, ĉu al kreo de nacio, mino-

ritato, ĉu al kreo de tutmondeco? Aŭ ĉu tio, kio estas socie valora, kreita de Esperanto-uzantoj sed ne rekte pri/por-Esperanta, ekzemple *Lingva Festivalo*, estas valora por Esperantujo kaj ĝia kulturo?

La interkonsentado en Esperantujo pri kion alpreni, kiajn valorojn akcepti, okazas malrapide. Tio parte ŝuldiĝas al la fakto, ke la socio troviĝas geografie disse tra la mondo, kaj al tio, ke ne ekzistas tre multe da videbligantoj de Esperanto-kulturo, nek iu, kiu gvidus larĝan kulturpolitikon, nek ekzistas grandega, dinamisma merkato. Krome, ŝajnas al mi ke la uzantoj de Esperanto rigardas ofte al siaj naciaj kulturoj por trovi valorojn, kaj tra ties okulvitroj rigardas la Esperanto-kulturon, enportante la naciajn kaj proprajn valorojn en Esperantujon. Ankaŭ ekzistas homoj, kiuj serĉas internaciajn valorojn, ekzemple en la UN-sistemo, aŭ en la jam internaciiginta amaskulturo. Ĉu do la sumo de la naciaj kaj internaciaj valoroj konsistigas la Esperanto-valorojn? Aŭ ĉu Esperanto-kulturo havas proprajn valorojn? Mi pensas ke ambaŭ demandoj validas. Kaj mi pensas, ke estus interese esplori tiun kampon pli profunde je alia okazo.

Ekzistas homoj, kiuj volas nomi kulturo nur la t. n. altan kulturon, kaj aliaj, kiuj volas ke Esperanto-kulturo anstataŭu la nunan usondevenan amaskulturon, dirante, ke normoj kaj valoroj sensenciĝis sub la invado de la populara kulturo. Sed eble ni demandu, al kio utilas la t. n. alta kulturo, por kiu ĝi kreiĝas, kaj ĉu ĝi portas ion esencan por la komuna bono? Kaj ankaŭ, ĉu ne amaskulturo estas same kulturformo kiel ĉio alia?

5. Esperanto-kulturo kaj la mondo

5.1 Ĉu Esperanto-kulturo valoras?

Esperanto-kulturo ekzistas, do ĝi estas valora. Tiu premiso fontas el la logiko, ke ĉar kulturo ekzistas, ĝi estas valora. Por iu — ie. Se neniu valorigus ĝin, ĝi ne ekzistus — malvalorigata kulturo formortas, ĉu pro influo de pli valorigata el-ekstera kulturo, ĉu pro interna evoluo.

Valorigado do ekzistigas kaj kreas la bazon por la plua vivado de kulturo. Esperanto-kulturo el tiu perspektivo estas kiel ajna alia kulturo. Ĉiaj kulturformoj, teatro, literaturo, arto, muziko, danco kaj tiel plu ekzistas en la Esperanto-kulturo. Esperanto-kulturo esprimiĝas pere de i. a. libroj, diskoj kaj prezentoj, kaj funkcias sur tutmonda nivelo, por tutmonda publiko, kiu pro iu kialo sin sentas ano aŭ ligita al tiu kulturo. Ĝi baziĝas principe sur ideoj kaj koncepto tutmondismaj, sed ĉiu kulturaganto, ĉu Esperantisto, ĉu muzikisto, ĉu eldonisto, kaj ĉiu kulturkonsumanto havas siajn proprajn kialojn por sia ligiĝo al Esperanto-kulturo. Nuntempe eblas ĝin ĝui same kiel ajnan alian kulturon — kaj same malfacilas ĝin eniri, kompreni, kiel ajnan alian kulturon.

Kaj same kiel aliaj kulturoj, Esperanto-kulturo kreis siajn subkulturojn, junularan, movadisman kaj pluraj aliaj. Ankaŭ ili valoras, ĉar ili estas parto de la kulturo, kaj ili vivas, ĉar ili valoras por iu, ie en la mondo.

5.2 Originalas?

Kiu decidis, kio estas originala?

Mi ne renkontis ĝis hodiaŭ, malgraŭ jaroj da studoj pri kulturoj diversloke en la mondo, kulturon, kiu izolite evoluus al tre, tre originala kaj malsamega al ĉiuj aliaj. Ĉe ĉiuj kulturoj, post iom pli proksima rigardo, montriĝas ke ili dialo-

gis aŭ dialogas kun aliaj, plej ofte geografie proksimaj kulturoj. Kulturo, kiu ne plu dialogas, formortas pro interna sufokiĝo. Estas unu el la grandaj mitoj de la okcidentisma pensado, ke ekzistas Unikaj kaj Originalaj kulturoj sen ajnaj kontaktoj kun la ekstero. Eĉ Eŭropo, kie naskiĝis tiu ideo, ne konsistas el izolitaj kulturoj. Kial do al la resto de la mondo aplikigu tiaj ideoj?

Luj kondamnas la „postkureman” evoluon de la Esperanto–kulturo, nome ke kulturagantoj imitas siajn naciajn kulturojn kaj nomas tion Esperanto–kulturo. Mi nomus tion dialogo. Sen tiu dialogo, kiu estas fruktodona por la Esperanto–kulturo, malfacilas krei kulturon, kaj plu viviĝi kulturon. Esperanto–kulturo estas hodiaŭ iom pli ol 100–jara. Sen imitado, sen tiu dialogo, ĝi ne plu vivus hodiaŭ. Al tiu dialogo apartenas kaj la tradukita literaturo, kaj la pruntoj fare de muzikistoj pri melodioj, kaj la amaskulturo, kaj la hajkoj kaj ĉio alia. Ĉu via t. n. nacia kulturo estas iamaniere alia, ol miksaĵo de tradukaĵoj, pruntaĵoj kaj tio, kion homoj el via kulturo mem kreas, ĉu influite de ekstero, ĉu pro interna bezono krei?

Esperanto–kulturo iom malmulte „respondas” al aliaj kulturoj, ĝi pli prenas ol donas. En tio ĝi ne tre diferencas de ajna pli eta lingvo kaj kulturo, sed tio havas ĉefe merkatajn kialojn, kaj dependas ankaŭ de tio, ke la Esperanto–uzantoj malmulte prezentas ĝin al ekstero. Ĉu pro tio ke ili ne konsideras Esperanto–kulturon sufiĉe valorata, sufiĉe bona por prezenti? Ĉu ĉar mankas kvalitataj tradukistoj en naciajn lingvojn, aŭ ĉu ĉar mankas memfidaj teatraj trupoj kaj vigla agentejo por la disfamigo de rok–bandoj?

Esperanto–kulturo evoluas proprapaŝe, paralele al aliaj kulturoj, kaj ĝi samgrade aŭ samkvante originalas kiel ili. Jes, eble ĝi aspektas ekzotike por homo, kiu nenion scias pri Esperan-

to. Samtempe ĝi donas grandegajn eblecojn por evoluo, persona kaj kultura. Luj diskutas, ĉu ĝi estu nur perilo, ĉu ekzemple tradukaĵoj estu konsiderataj parto de la kulturo, aŭ ĉu Esperanto–kulturo estu „originala”, propra kulturo „sen ekstera influo”. Mi demandas min, ĉu ne ambaŭ eblas samtempe? La historio montras, ke ĉiam la Esperanto–kulturo funkciis en ambaŭ manieroj. Laŭ mi tio estas parto de ĝia evoluo kaj ĝia dialogo kun sia socio kaj kun aliaj socioj kaj kulturoj, kaj lingvoj.

6. Kulturo, mono kaj politiko

6.1 Disvolviĝo

Por la disvolviĝo de kulturo, pli konkrete por produkti kulturon, oni bezonas monon. Oni bezonas monon por presi, fari diskojn, prezenti teatraĵon. Kaj oni bezonas ankaŭ publikon. Manko de mono povas malhelpi la produktadon, sed ne la kulturan evoluon. Manko de publiko povas malhelpi la pluekziston de la kulturo aŭ de certaj kulturformoj.

Kio do instigas al kultura produktado? Por kulturaganto temas pri kelkaj konsideroj. Mono por vivi estas la plej malgrava, ĉar malmultaj povas sin vivteni per verkado aŭ komponado aŭ arto ie ajn en la mondo. Interna bezono estas eble la plej grava. Por produktisto temas same pri pluraj faktoroj, sed ĉe produktistoj aldoniĝas tuj la demando pri mono: ĉu indas, ĉu valoras la penon, la monon kaj la tempon produkti tion ĉi?

Rekte transportite al Esperanto–kulturo, la demando ankaŭ estas: ĉu Esperanto–kulturo sufiĉe valoras kaj sufiĉe repagiĝas, por ke mi produktu? Ŝajne por pluraj la respondo estas jes. Alikaze ne ekzistus tiom da produktistoj, kaj tiom da novaj produktoj kaj projektoj.

La rolo de la merkato, publiko, estas grava. Se kulturaganto aŭ produktisto ne

trovas publikon, li aŭ ŝi malfacile daŭrigas sian laboron. Ne ĉiuj ĉesas, feliĉe, ĉar se estus tiel, multaj perloj de la literaturo aŭ muziko neniam atingus nin. Kiel mi jam diris, kulturo ne havas geografiajn limojn, kaj preskaŭ same validas por tempo. La diferenco estas, ke kelkaj produktaĵoj bezonas certan etoson, certan tempon, por trovi sian publikon. Aŭ ĉu estas tiel, ke la publiko trovas la produktaĵojn?

La Esperanto-publiko trovas sian kulturon ne nur en libroj, interreto kaj per aliaj iloj, sed ankaŭ rekte kaj senpere dum renkontiĝoj. Sed kia kulturo prezentiga estas tie? Ĉu sufiĉe? Kian rolon ĝi ludas por la publiko? Kiajn rolojn ludas ekzemple Kultura Esperanto Festivalo por sia publiko? Kongresoj, forumoj, kunvenoj, klubaj aranĝoj? Kaj kiel oni povas pli riĉigi, pli valorigi la kulturon dum renkontiĝoj? Klerigi la partoprenantojn pri Esperanto-kulturo? Riĉigi la Esperanto-kulturon per rektaj kontaktoj inter produktantoj, agantoj kaj publiko? Ekzistas multaj eblecoj, kiujn oni ĝis nun ne sufiĉe uzis.

Politiko povas ludi rolon en la decido, kian kulturon oni kreas. Ŝtata politiko povas direkti la evoluon, malpermesi, subteni certan ĝenron, kontroli, malhelpi aŭ helpi, sed ĝi ne povas haltigi la kulturon tiom longe, kiom ekzistas homoj, kaj ĝi ne povas malhelpi, ke ekzistu diversaj formoj de kulturo, ankaŭ tiaj, kiajn ĝi ne akceptas. La spertoj en orienta Eŭropo montras, ke kulturo vivas, kaj ĉiam trovas vojojn, ankaŭ dum plej rigoraj malpermesoj. Kulturo vivas sian propran vivon, kaj en la estonteco ankaŭ tiel faros.

6.2 Merkato

Ofta plendo pri Esperanto-kulturo estas, ke mankas al ni mono. Ĉar la merkato ne grandas, kaj ĉar Esperanto-kulturo estas malgranda kaj ne povas vivi kaj prosperi apud la gigantaj usona kaj ja-

pana aŭ ajna alia kulturo, malantaŭ kies disvastigo kuŝas milionoj da dolaroj aŭ aliaj valutoj kaj tuta vendo-aparato. Iuj demandas eĉ, ĉu oni vere povas vivi per Esperanto-kultura produktado, kaj iuj plendas, ke Esperanto-kulturo ne estas sufiĉe riĉa aŭ kvalita por konsumado.

En la mondo ekzistas multaj etaj kulturoj, eĉ pli etaj ol Esperanto-kulturo, kiuj bone vivas, kaj sin direktas al la propra merkato kaj la propraj bezonoj. Ili ne pretendemas je tutmonda rekono, nek je tutmonda merkato, sed tute kontentigas pri sia propra regiono aŭ popolo. Riĉeco mona ne nepre kunligiĝas kun riĉeco kultura ĉe ili, nek rilate al la konsumado ili dependas de la tutmonda vendomaŝino.

Ilin regas la samaj merkataj leĝoj kiel ĉiujn, sed ili havas tute konkretan celon, nome kontentigi certan, limigitan publikon. Esperanto-kulturo momente pli eniras tiun ĉi bildon ol paraleliĝas kun la grandaj kulturoj, kaj mi pensas, ke de ĉi tie ni devas eliri, se ni volas diskuti Esperantan kulturan produktadon.

Mia sperto kiel eldonisto kaj kulturaganto montras, ke ekzistas merkato por Esperanto-produktoj. Oni povas sin vivteni per Esperanto — jam multaj faras. Neniu monopolas la Esperanto-kulturon, sed ekzistas pluraj sendependaj produktantoj kaj kulturagantoj, kiuj kreas ĉiujare kreskantan nombron da produktoj, kiuj ankaŭ vendiĝas al ĉiam kreskanta merkato precipe en landoj ekster okcidenta Eŭropo.

Ĝis nun tamen mi ne vidis merkatan analizon pri Esperanto-produktoj, sed estus interese scii, kion volas la merkato, kiajn bezonojn ĝi havas rilate al la produktoj, ĉu ĝi ricevas kion ĝi volas, kaj ĉu ĝi pagas adekvatan prezon por tio, kion ĝi ricevas, aŭ ĉu ĝi pretus pagi pli, por ricevi pli? Min ankaŭ interesus scii, kiel aspektas la profilo de tipa Esperanto-konsumanto, kaj kio gvidas la merkatan

konduton de li aŭ ŝi. Krome, mi ŝatus scii pli pri la produktantoj, kaj pri la kulturagantoj. Kiom konscias ili pri la merkato? Kiaj eblecoj ekzistas por evoluigi la produktadon?

Ĉu Esperanto-kulturo diskoniĝas tra la mondo, ĉu ĝi vendiĝas al Esperantuanoj, ĉu ĝi konsumiĝas, tio dependas de la agantoj kaj produktantoj, de merkata politiko, de vendometodoj kaj de informado kaj pluraj aliaj faktoroj. Sed, por ke Esperanto-kulturo pluvivu, necesas edukigo pri ĝi, necesas videbligantoj de ĝi, necesas pli da konkurenco, kio pozitive instigas al evoluigo de la produktoj kaj vendado, kaj necesas, ke la produktado respondu al la bezonoj de la merkato, kaj ankaŭ kreu merkaton por novaj produktoj.

Ni ne ploru pri tio, ke nur malgranda parto de la Esperanto-uzantoj konsumas aŭ konscias pri Esperanto-kulturo. Laŭprocente mi supozas, ke ili estas same multaj kiel en ajna alia kulturo. Same multaj aŭ malmultaj kiel la tradukaĵoj en la literaturo, same kiel la kulturagantoj, diskoaĉetantoj en ajna kulturo. Sed la kreskigo de la procentaĵo dependas de ni, kiuj jam konsumas, kiuj produktas kaj kiuj instruas, varbas, parolas pri kaj en Esperanto.

Grava demando por Esperanto-kulturagantoj ankaŭ estas: kiel ni povus valorigi Esperanto-kulturon ne nur por ni mem, sed ankaŭ por ekstera publiko? Tial mi pensas, ke gravas diskuti, kune, pri novaj vojoj, novaj eblecoj, kaj pri komuna politiko en kelkaj kampoj. Tio povas profitigi kaj la individuajn produktistojn, kaj la tutan kulturon.

6.3 Ĉu ni bezonas kulturpolitikon?

Kulturpolitiko signifas, en plej bona kazo, riĉigon de la propra kulturo kaj disvastigon de ĝi al publikoj ekster la propra.

En plej malbona kazo, ĝi signifas subpremon kaj elitismon, favoradon kaj inerton.

En Esperantujo ekzistas pluraj, kiuj faras sian propran kulturpolitikon. Ĉis nun ne ekzistas unu instanco, kiu farus tut-Esperantujan kulturpolitikon, kaj la fortoj estas tre disaj kaj en multaj kazoj pro tio malfortaj. Ankaŭ la agado ne sufiĉas. Kial multaj Esperanto-uzantoj ne povas diri, kiuj estas la kvin plej gravaj aŭtoroj en Esperanto? Tion povas fari ajna homo pri sia nacia lingvo, ĉar li aŭ ŝi lernis, eĉ malgraŭ tio, ke li aŭ ŝi eble forestis mense aŭ fizike de lernejoj lecionoj — tamen la informoj iel atingis.

Kial do ili ne atingas la Esperanto-uzantojn? Kial novulo aŭ nepagipovulo devas elspezi multan tempon kaj monon por trovi bazajn legolibrojn pri Esperanto, ĝia historio, movado, kulturo? La nuna situacio neniel estas alloga por novulo, nek por homo el ekster okcidenta Eŭropo kaj Usono. Pro transpagoproblemoj, pro malfunkciantaj aŭ tro kostaj libroservoj, pro manko de facilaj legaĵoj kaj ĉefe pro manko de bona, klara prezento pri Esperantujo kaj kiel navigi en ĝi, karakterizaĵoj kaj bazaj servoj, multaj potencialaj klientoj kaj Esperanto-uzantoj forturniĝas. Ili bezonus facilan aliron al la produktoj, facilan eniron en Esperantujon, kaj allogan produktaron, por ke ili restu. Ĉu ni ne povus tion provizi al ili?

Ŝtatoj pli simple kreas kulturpolitikon: ili havas limigitan geografian areon, limigitan publikon kaj klarajn monfontojn. En Esperantujo ekzistas pluraj unuopaj aŭ kelkopaj agantoj, kaj ne tre klaraj linioj pri tio, kiel oni povas valorigi Esperanto-kulturon por la propra publiko kaj por la ekstera mondo, kaj kiel valorigi Esperantujon per kulturo.

La demandoj stariĝas per si mem: ĉu ni bezonas instancon, centron, decidan organon por modeli aŭ koncentrigi la kultu-

ran agadon de Esperantujo? Se jes, kian? Se ne, ĉu ni entute bezonas oficialan kulturpolitikon de Esperantujo? Kaj kiu kreu ĝin? Kiel ĝi aspektu? Kiu parolu, en kies nomo? Ĉu ekzistu unu aŭ pluraj direktoj? Kaj kiajn kulturagantojn, kiajn produktistojn bezonas la Esperanto-kulturo por disvolviĝi plu, por kreski kvante kaj kvalite? Kian publikon? Kion ni, la agantoj kaj la publiko, volas legi, sperti, aŭskulti en Esperanto? Kiel stimuli Esperanto-kulturon, ĉu mone, ĉu politike? Kiuj finfine estas la bazaj problemoj, kaj kiel ni povus ilin solvi?

Tiuj ĉi demandoj rilatas ĉefe al la produktado. Kiel mi jam diris, kulturo vivas sian propran vivon ekster ĉiuj strukturoj, kaj ĉu ĝi estas kvalita aŭ ne, dependas de ĝiaj agantoj kaj iliaj personaj kapabloj. Sed la produktado kaj la surmerkato povas profiti de ia kunigo de fortoj, ekzemple reto, kaj la socio de klerigocela kulturpolitiko. Pli granda publiko konscia pri kulturo kaj konsumanta ĝin povas krei pli da bezono, kaj pli da profesiaj agantoj kaj produktistoj, kio denove povas krei pli da publiko, pli da merkato, kaj pli da produktoj. Konsumado, do, ne estu fivorto, sed kreo de merkato estu unu el niaj komunaj celoj.

Esperantuja kulturpolitiko ekzistu, laŭ mi, por krei facilan aliron al novuloj kaj por klerigado ene de la movado, por popularigo de Esperanto-kulturo kaj historio inter la Esperanto-lernantoj kaj jamaj lernintoj. Mankegas momente la kleriga dimensio — nur kelkaj produktistoj okupiĝas pri tio sisteme. Radiostacioj, revuoj, teatroj kaj aliaj povus okupiĝi pri klerigado, kaj organizoj povus atenti pli pri manlibroj, facillingvaj, por novuloj. Por ĉio ĉi indas eluzi la novajn komunikrimedojn, inkluzive de interreto kaj reklamaj kompaktdiskoj, paralele al la tradiciaj libroj kaj informbroŝuroj.

La alekstera kulturpolitiko povus kon-

sisti el kunordigo kaj stimulado de traduklistoj, kiuj tradukas el Esperanto al aliaj lingvoj, kunlaboro inter produktistoj por stimuli la vendadon de Esperantaj produktoj al la ekstero kaj kreado de serioj de mallongigitaj, facillingvaj versioj de ĉefaj Esperanto-verkoj. Esperanto-kulturo neniel suferos kvalite de tio, male, pli da homoj ekhavas apetiton por lerni kaj legi pli, se ili jam kiel lernantoj konatiĝas kun la ĉefaj nomoj de Esperanto-kulturo en facile digestebla formo. En situacio, kie falas la membronombroj de la grandaj asocioj, kaj malgrandiĝas la abonantaro de pluraj tradiciaj revuoj, ni bezonas novan aliron al Esperanto kaj Esperanto-kulturo.

7. Konkludoj

Dum tiu ĉi prelego mi plurfoje alvokis al seriozaj esploroj pri diversaj temoj, al kunigo de fortoj kaj ŝanĝo de sinteno rilate al pluraj bazaj demandoj pri la Esperanto-kulturo. Tamen, la bazo por ĉio ĉi estas la sinteno: se Esperanto-uzantoj havas komplikajn rilatojn al Esperanto, ekzemple hontas pro sia ligiĝo al ĝi, malfacilas labori por ŝanĝoj, kaj malfacilas disvastigi Esperantujon. Kaj kial fakte honti? Scii plian lingvon kaj vivi paralele en pluraj kulturoj estas hodiaŭ priflerinda privilegio, kiun ne ĉiuj ĝuas. Iuj ankaŭ hontas, ke ili ŝatas komiksojn, aŭ t. n. kiosko-literaturon aŭ subgrundan muzikon, sed ankaŭ tio estas parto de la kulturo, kaj en ĉio ni strebu vastan kaj kvalitan produktadon.

Iuj diras, ke Esperanto-kulturo malfruas en sia evoluo. Mi demandus: kompare al kio? Al kio malfruas aŭ fruas kulturoj? Ĉu al la tutmonda evoluo? Sed kio estas tiu tutmonda evoluo? Ĝi ne estas unueca. La aŭstra verkisto loĝanta en Germanio Hans Magnus Enzensberger antaŭ kelkaj jaroj lanĉis la koncepton, ke Eŭropo vivas en malsamaj tempoj en di-

Stanisław Lem (1921–2006)

Stanisław Lem naskiĝis la 12an de septembro 1921 en Lvovo. Tie li komencis en 1940 medicinajn studojn, kiujn li daŭrigis en la Medicina Instituto de 1944 ĝis 1945. Kiam finiĝis la mondmilito, oni revenigis la junan Lem kun familianoj al la patrolando. Ili elektis Krakovon kiel loĝlokon, kie li finis studi medicinon



versaj regionoj. Tiel ankaŭ pri kulturoj. Ĉiu kulturo havas sian propran ritmon, sian propran vojon kaj evoluon. Esperanto–kulturo evoluas tiel, kiel ni evoluigas ĝin, ni la agantoj, produktantoj kaj publiko.

Mi ŝatus fine esprimi miajn admiron, ĝojon kaj dankemon al ĉiuj kulturagantoj, kulturproduktantoj, kulturkonsumentoj kaj ĉiuj homoj, kiuj iam ie legas linion aŭ aŭskultas kanton en Esperanto, ĉiuj antaŭ ni, kaj ĉiuj post ni. Sen vi ne ekzistus Esperanto–kulturo, kaj la mondo estus pli malriĉa. Kaj ankaŭ mi.

Tute laste, mi ŝatus citi Antoine Meillet el la jaro 1918, kio resumu mian prelegon:

Ĉiu teoria diskuto vanas: Esperanto funkcias!

dum tri jaroj (1946–1948) en la Jagelona Universitato. Baldaŭ li komencis publikigi siajn artikolojn en medicinistaj gazetoj kaj revuoj, recenzojn kaj sciencajn felietonojn. Kiel verkisto li debutis en 1946 en la Katovica semajnavuo *Nowy Świat Przygód* (Nova Mondo de Aventuroj) per la romano *Człowiek z Marsa* (Marsano), skribita dum la milito, kaj la unua verko *Astronauta* (Astronaŭtoj) aperis libroforme en 1951. La postaj verkoj havigis al Lem opinion de la plej eminenta reprezentanto de pola scienca fantastiko. Samtempe li renovigis ĝiajn problemojn kaj ĝenrostilon. Kiel esisto–futuraologo li disfamigis sian nomon internacie. Oni tradukis liajn verkojn en 30 lingvojn (plej ofte en Usono kaj Sovetio). Li estis membro de asocioj Science Fiction Research Association kaj Science Fiction Writers of America.

En la centro de la verkistaj interesoj de Lem troviĝis scienco, procezoj de scienca ekkono, eblecoj de moderna scienco, ĝia estonteco. Teknika imagokapablo, elstara inventemo en la kreado kaj nomado de novaj mondoj, aperiaĵoj, leĝoj en fiziko kaj biologio — estis por li maniero konsciigi legantojn pri la ĉefa prob-

lemo, kiu estas homo rilate al propra konopovo. La verkisto mem volonte enkondukas en siajn konsiderojn ankaŭ motivojn el la sfero de moralo, erotiko, mekanismoj de medio-vivo. Tamen la afero, kiu plej forte spronas imagon ĉe li, estas kunpuŝiĝo de la racio kun la materia mondo. La scienco fantastiko estas por li scenejo, kie tiajn aperaĵojn oni povas riĉigi kaj disvolvi en cirkonstancoj de la imagata progreso de scienco kaj tekniko.

En la unua periodo — kun romanoj: *Astronauti* (1951), *Obłok Magellana* (Nubeto de Magelan, 1955), *Eden* (Edeno, 1959), *Powrót z gwiazd* (Reveno de steloj, 1961) — la imagon de Lem pli forte spronis vizio de teknikaj eblecoj, kaj vojaĝo en kosmon, en teknologian estonton estis ĉefa fonto por verkistaj ideoj. Tiaj vojaĝoj fariĝis kaŭzo de antaŭvidado kaj esperoj, sed ankaŭ de antaŭjuĝoj kaj timo ligitaj kun progreso de la homa civilizo. Iom post iom ĉiuj ĉi antaŭjuĝoj kaj avertoj prezentiĝis kiel ĉefa bazo por fantaziaĵoj. Homo minacata de la potencoj, kiujn li mem liberigis — tiu motivo reaperas en plej diversaj variantoj, ankaŭ en multaj verkoj kun ŝerco-groteska enhavo, stiligitaj kiel fabela alegorio, kavalira eposo, filozofia novelo (rakontaroj *Dzienniki gwiazdowe* (Stelaj taglibroj, 1957), *Księga robotów* (Libro de robotoj, 1961), *Bajki robotów* (Fabeloj de robotoj, 1964), *Cyberiada* (Ciberiada, 1965), *Opowieści o pilotcie Pirxie* (Rakontoj pri piloto Pirks, 1968). La progreso de supertekniko dubigas ĉi tie klasikajn valorojn de humanis-

mo kaj ŝajnas kontesti homan integrecon. Demandoj pri loko de homo en nova teknologia situacio, pri lia rezisto al ĝiaj psikaj sekvoj, pri eblecoj de ekzisto kaj ekono de aliaj, eksterhomaj manieroj de konscio (*Nevenkebla* (Niezwyyczajony, 1964; *Maska* (Masko, 1976), koncentrigas sin ĉirkaŭ problemoj de la ontologia bazo de homeco, vigle diskutataj en la modernma filozofio. Tia homeco ne estas valoro subiĝanta al teknologia reproduktado. Rimarkinda distingilo por la homa vivo estas ĝiaj malfirmo kaj maldaŭro. Finitaj estas limoj por la adaptaj eblecoj de homo, li ne povas ekzisti en amaso da plej diversaj psikaj realoj, ĉar ili detruas lian memon. La homaro estas soleca kaj solece konstruas sian universon spiritan — jen averto, el kiu fontas la premiso de la ĉefaj romanoj de Lem — *Solaris* (1961), *Pamiętnik znaleziony w wannie* (Memorlibro trovita en bankuvo, 1961) kaj *Głos Pana* (La voĉo de la Sinjoro, 1968).

Krom romanoj kaj noveloj Lem verkas ankaŭ prozon diskursan.. En siaj kolektoj de eseoj *Dialogi* (Dialogoj, 1957 kaj 1972 — pli ampleksigita kaj ŝanĝita eldono), *Wejście na orbitę* (Enorbitiĝo, 1962), *Summa technologiae* (1964 kaj 1967 — pli ampleksigita eldono) li konsideras ligojn inter teknika civilizo kaj evoluo de la homo kiel biologia specio, limojn de homaj sciado kaj konado, etikajn kaj kulturajn minacojn pro la progreso de teknologio kaj scienco. Meze de la 60aj jaroj aperis ĉe Lem nova temo: literaturo kiel mani-

ero de konado kaj kreado de alia realo. Siajn konsiderojn li kunmetis en la verkon *Filozofia przypadku. Literatura w świetle empirii* (Filozofio de hazardo. Literaturo en lumo de empirio, 1968). Ili eniris ankaŭ en la esearojn *Fantastyka i futurologia* (Fantastiko kaj futurologio, 2 volumoj, 1970) kaj *Rozprawy i szkice* (Diskursoj kaj skizoj, 1975). Tiuj verkoj estas Lema polemiko kontraŭ ekzistantaj teorioj pri beletro (ĉefe struktur-semiotikaj). La verkisto montras kampojn de ekkona nedifinebleco kaj nesufiĉeco, malkaŝita en tiuj ĉi teorioj. Kaj samtempe lia imago de prozisto-artisto serĉas manierojn por efektiviĝo de aliaj formoj de literatura prezentado. Spiteme kaj ŝerceme li kreas fikciajn verkojn. Tiel inventite kaj aranĝite eldoniĝis kolektoj de pastiĉoj kaj parodioj *Doskonała próżnia* (Ideala vakuo, 1971) kaj *Wielkość urojona* (Imagita grandeco, 1971) — kiel preparolo kaj pritrakto de libroj, kiuj neniam estis skribitaj, sed ekzistas kiel penseblo.

La fantast-sciencia romano estis en la verkado de Lem nur etapo. Li disvolvis novajn eblecojn de tiu ĝenro, li enkondukis novajn problemojn en siajn librojn. Li vivigis la tutan ĝenron per ŝerco kaj grotesko. Tamen ĝis la fino li restis fidela al la plej grava inspiro, manifestiĝanta en la demando pri la valoro de tio, kio estas homa, kaj venanta al la konkludo: kion ajn estus faronta la homo, kiajn ajn mondojn li estus kreonta kaj ekkononta — li mem, lia naturo, liaj spiritaj ka-

pabloj restos por li idealo kaj imitinda ekzemplo.

En la 80aj kaj 90aj jaroj la verkemo de grave malsana Lem fariĝis pli kaj pli malvigla. El tiu ĉi tempo elstaras romanoj *Wizja lokalna* (Surloka esploro, 1982), *Prowokacja* (Provoko, 1984) kaj *Fiasko* (1987). Plej interesa estas *Wizja lokalna*, en kiu la verkisto prezentas demandon pri la plej bona civilizo, en kiu la homo sentus plenen de sia ekzisto. [Ĝuste el ĉi tiu romano ni prenis ĉapitron tradukitan de Jurij Frenkel, aperontan en la sekvonta kajero de PE — red.].

El ampleksa verkaro de Lem menciindas ankoraŭ roman-ciklo *Czas nieutracony* (Tempo neperdita, partoj 1–3, 1955), kies unua parto *Szpital Przemienienia* (La hospitalo de la Transfiguriĝo), reeldonata kiel aparta verko, esprimas verkistan provon de la metafora diagnozo pri tio, kia estis idea sinteno ĉe intelektuloj komence de la mondmilito. (Ĉi romanon sukcese filmigis reĝisoro E. Żebrowski en 1978).

Krome rimarkindaj estas aŭtobiografia rakonto kun esea formo *Wysoki Zamek* (Alta Kastelo, 1966) kaj du romanoj *Śledztwo* (Juĝesploro, 1959) kaj *Katar* (Kataro, 1976), en kiuj sensaci-kriminala intrigo miksiĝas kun fantast-sciencaj temoj.

En 1973 la fama sovetia reĝisoro A. Tarkovskij brile filmigis la romanon *Solaris*.

Stanisław Lem mortis la 27an de marto 2006 en Krakovo.

Andreas Künzli (Svislando)

Pri ‘polaj eventoj’ ktp.

Kun ioma intereso mi legis la respondon de Pola Esperanto–Asocio „pri ĵonglado per la ‘polaj eventoj’, kiu estis aldonita kiel suplemento al *Pola Esperantisto*, n-ro 2/2006. Ĉi tiu reago al la „konkluda raporto” de la Esperanta Civito (EC) pri la polaj eventoj lige kun la t.n. „puĉo” de la jaro 1985 estis subskribita de Stanisław Mandrak, prezidanto de PEA, kaj Edward Kozyra, vic-prezidanto de PEA.

Mi tute konsentas kun la opinio de Kazimierz Leja, ĉefredaktoro de *Pola Esperantisto*, kiu skribis sur p. 33 de la sama eldono de *PE*: „...anstataŭ ofendi unu la alian, publike esprimi (ne ĉiam proprajn) opiniojn anstataŭ prezenti faktojn, inciti kaj juĝi, pola Esperantujo — por si mem kaj por la historia vero — devas fondi seriozan, kompetentan Komisionon, kiu finfine kolektos kaj prilaboros dokumentojn, kiuj certe troviĝas i.a. en IPN (Instituto pri Nacia Memoro), enketi ‘neanonimajn’ personojn, kiuj partoprenis tiujn eventojn, kaj — de kio dependas ĉio — ŝanĝi sian sintenon rilate al propra historio kaj propraj arĥivoj. Neniu serioza organizaĵo lasas tiajn aferojn por preskripto; kontraŭe — se ni, polaj esperantistoj, volas konstrui novan kvaliton de nia komuna Esperantujo, ni devas fermi pasintajn tempojn. Fermi, ne prisilenti”.

La saman agmanieron mi sugestis al Roman Dobrzyński lige kun la aperigo de nomoj de konataj esperantistoj en la fama Wildstein–listo de IPN. En tiu listo estas troveblaj la nomoj de Roman Dobrzyński, Erika Ilse Alice Dobrzyński, Marian Dobrzyński, sed ankaŭ de Krystyna Zaleska Szenkier Zamenhof kaj de (iu) Ryszard Rokicki. Eble estas ankoraŭ aliaj. Laŭ mia scio ĝis nun neniu el tiuj personoj publike konfirmis, ĉu temas pri ili mem aŭ ne kaj ĉu ili intencas havigi al si la koncernajn dokumentojn el IPN. Eble UEA devus iom atenti kiujn honorajn membrojn ĝi proklamas antaŭ ol ilia rolo dum la komunisma tempo ne estis tute klarigita. Se aperas duboj pri ‘politika’ rolo, ĉiu nomumota honora membro de UEA — kaj principe de ajna alia Esperanto–organizo — devus publike deklari sian iaman rolon en la politika sistemo de sia lando, des pli en la kazo de eksaj komunismaj landoj, al kiuj en multaj kazoj evidente iom mankas la intereso kaj la kuraĝo okupiĝi pri sia propra historio.

La ‘polajn eventojn’ kaj ankaŭ ĝenerale la tiklan historian pasintecon de la Esperanto–movadoj ne nur en Pollando, sed ankaŭ en aliaj eks–komunismaj landoj, povus/devus esplori kaj solvi nur neŭtrala komisiono; nek la Esperanta Civito, kies morala signifo fakte estas pseŭda kaj ĝia aŭtoritateco nula, nek tiamaj ‘ŝargitaj’ koncernitoj de Pola Esperanto–Asocio taŭgus por tiu tasko, ĉar ilia sendependeco kaj neŭtraleco ne estas garantiataj (aktivuloj el la tiam periodo ja povus estis konsultitaj kiel atestantoj). Tia komisiono povus esti

formita ekzemple laŭ la modelo de la t.n. sendependa Bergier-komisiono de historiistoj-ekspertoj, kiu esploris ekde decembro 1996, taskita de la svisa registaro, la rolon de Svislando dum la dua mondililito (precipe lige kun la judaj havaĵoj). Al tiu komisiono apartenis cetere ankaŭ la juddevena polo Władysław Bartoszewski. Tiu komisiono publikigis en 2002 la raporton „Svislando, la nacisocialismo kaj la dua Mondmilito”. En la kazo de Pollando al tia raporto, kiu prezentus la finajn rezultojn de la esploro, povus esti donita analoga titolo (ekz.: Pollando, la komunismo kaj la Esperanto-movado).

Mi kredas, ke por la Esperanto-movado (ankaŭ por UEA kaj ties landaj asocioj en Orienta Eŭropo) mem estus tre grave kaj utile prilabori la tiklajn flankojn de sia historio. Persone mi ne ŝatus aparteni al organizaĵo, al kiu aliaj iam eble riproĉos, ke ĝi maldiligente traktis aŭ eventuale eĉ kaŝis sian historian veron. Pro tio mi (kiel sviso al kiu oni certe diros, ke mi ne enmiksiĝu en la aferojn de la ekskomunismaj landoj) alvokas ĉiujn koncernitojn ĉesigi sian hezitan aŭ konfuzan politikon kaj aktive kaj memkritike kunlaboru en la heligo de la propra historio. Por tiu celo la koncernaj arkivoj ne nur en Pollando, sed ankaŭ de UEA, devus esti alireblaj, sed nur al kompetenta kaj oficiala komisiono. Prokrasti tiun devon ne havus sencon kaj povus esti ioma malavantaĝo por la laboro kaj identeco de la estontaj generacioj de esperantistoj.

Cetere povas esti, ke oni faras tro da bruoj ĉirkaŭ la ‘polaj eventoj’. Tamen restas la nepra tasko esplori la historion de la Esperanto-movado en la komunisma tempo.



Jan Stanisław Skorupski (Svislando)

Polaj eventoj

Kio estas „polaj eventoj”, pri kiuj mi tre ofte legas kaj aŭdas en Esperantio? Tio estas nur la eventoj de tiuj, kiuj pri ili skribas aŭ parolas. Por Pollando kaj por poloj ili havas neniun signifon. En la respektivaj tekstoj troviĝas personoj, pri kiuj mi iam, precize — antaŭ 25 jaroj kaj iom poste, ne aŭdis en la kunteksto de batalo kontraŭ la milita stato en Pollando.

Agado de Pola Esperanta Asocio estis simile restriktita kiel — ekzemple — agado de Asocio de Polaj Literatoroj kaj aliaj grupiĝoj je intelekta karaktero, ĉar estis eldonita dekreto, kiu ĉiujn aliajn leĝojn subigis al la pova leĝo pri la milita stato.

Restriktoj kontraŭ Pola Esperanto-Asocio tute ne atestas, ke en tiu aŭ en alia grupiĝo estis geagantoj kontraŭ reĝimo, inverse, en la malpermesita asocio kaj en la komisarita asocio estis multaj apogantoj de la milita stato kaj de la totalisma sistemo, kiuj ankaŭ nun agas en la grupiĝoj, kiuj senĉese klaĉas pri tiu

ĉi afero, eĉ se ili iam silentis.

Universala Esperanto Asocio akceptis devige starigitan komisaran estraron de Pola Esperanto–Asocio, surbaze de sia iluzia neŭtraleco, sed kiam oni mortigas homojn, tiam oni ne povas kaj eĉ ne rajtas esti neŭtrala, tiam oni devas esti morala.

En tiu ĉi periodo, pro supre menciitaj faktoj, mi ĉesis mian membrecon de Universala Esperanto–Asocio.

Kelkaj aŭ eble eĉ pli da personoj volas esti herooj surbaze de tiel nomitaj „polaj eventoj” per revenado al tempo, en kiu ili estis tute pasivaj, alie, ili tiam zorgis nur pri sia ĉiutageco.

Herooj de tiama tempo estas nur tiuj, kiuj estis murditaj, kiuj estis karcerigitaj aŭ vivis kaŝe, redaktante kaj presante subterajn bultenojn, serĉitaj konstante de sekurserviluloj kaj aliaj ŝtataj agentoj.

Oni devas nepre aldoni, ke, krom tiuj rektaj batalantoj, estis tiam milionoj da homoj solidaraj kaj ne nur en Pollando, sed sur la tuta mondo, kaj dank’ al ili *Solidareco* venkis, inspirita antaŭe de papo Johano Paŭlo la Dua: „Ne timiĝu!”.

En Esperantio estis ankaŭ homoj solidaraj. Mi rajtas pri tio diri, ĉar mi iam provis geesperantistojn solidarigi, parte eĉ kun sukceso.

Revuo *MONATO* en marto 1982 aperigis mian alvokon esperante en formo de anonco kaj jenaj esperantaj verkistoj okazis solidaraj:

Luis Beaucaire, Clelia Conterno Guglielminetti, Wolfgang Günther, Maŭro Nervi kaj Richard Schulz per siaj verkoj, kaj Gerd Bussing, Hermann Ebeling, Raimund Riedel, Ina kaj Hermann Tautorat per tradukoj kaj per aliaj aktivecoj, ekzemple per gvidado de la spektakloj, kun kiuj mi traveturis tra la okcidenta Eŭropo, ĉiam kun tre kora akcepto.

Ada Fighiera Sikorska solidariĝis per leteroj kaj per presado, kaj Marjorie Boulton sendis poŝtkarton kun informo, ke ŝi solidariĝas kun mi en la agado kaj kun ĉiuj, kiuj en Pollando suferas.

Krome mi ricevis ankaŭ plastikajn kaj muzikajn verkojn, kiuj estis ekspoziciitaj en la galerio „sztuka polska” [pola arto — red.] en Berlino kaj ankaŭ en aliaj urboj, okaze de diversaj okazintaĵoj.

Post multaj jaroj mi tre volonte scius kion faras godoranaj limpolicistoj, kiuj min, kaj ĉeokaze aliajn, kiuj kun mi veturadis, ĉe la limoj ĉiufoje kelkajn horojn haltigis; kion faras la bulgaroj, kiuj volis malpermesi vendadon de miaj kasedoj, skribante oficialan proteston dum la Universala Kongreso en Antverpeno kaj poste en Loveno; kion faras agentoj, kiuj partoprenis dum Universala Kongreso en Varsovio en la pentra agado de „nula horo” antaŭ Palaco de Kulturo? Verŝajne ili ĉiuj skribas raportojn pri „polaj eventoj”...

Jan Stanisław Skorupski
Zuriko, la 26an de majo 2006

Edward Wojtakowski

Genealogio kaj nacilingvaj vortlistoj

Edward Wojtakowski faras konsiderindan fakan agadon pri genealogio. Li konsilas uzi en siaj retejoj nacilingvaj vortlistojn por ke ankaŭneesperantistoj eniru kontakton kun la esperantistoj.

Estimata samideano,

Esperanton oni povas kaj devas uzi por diversaj celoj. Komputile oni povas krei multegajn identajn kopiojn. Feliĉe homoj ankoraŭ ne estas programataj komputile kaj ne ekzistas du identaj individuoj. Homoj subtenas diversajn politikajn konceptojn, elektas diversajn studobjektojn, plenumas diversajn profesiojn, posedas diversajn talentojn kaj havas diversajn hobiajn.

Esperanto devas eniri en ĉiujn mediojn, sed varbado de homoj al buŝaj kursoj estas perdo de tempo kaj mono. Ni devas eluzi interreton. Kontakton kun interreto posedas jam kvarono de homaro, sed oni ne vidas tie Esperanton. Homoj enskribas ŝlosilvorton en retserĉilon en sia nacia lingvo aŭ en la angla kaj trovas naciajn aŭ anglalingvajn paĝojn pri temo, kiu ilin interesas. Laŭ mi oni devas volontigadi esperantistojn, ke ili redaktu esperantlingvaj retejoj pri temoj, kiuj ilin interesas kun laŭtemaj indeksoj en multaj naciaj lingvoj.

Antaŭ 5 jaroj mi elektis du temojn: genealogio kaj Eŭropo. Kune kun mia nevo Gregoro (studento pri elektroniko) ni redaktas pli ol 10 retejojn. Ĉiu retejo posedas laŭteman vortliston en 8-14 lingvoj. Se niaj retejoj ne posedus nacilingvajn indeksojn trovus ilin nur esperantistoj skribante ŝlosilvorton „genealogio”. Danke al nacilingvaj indeksoj niajn esperantlingvajn genealogiajn retejojn trovas personoj, kiuj enskribas ŝlosilvortojn: genealogy, genealogie, genealogia, familienkunde, rodokomen, család-fa ktp.

Niajn retejojn vizitas ĉiutage ĉirkaŭ 1500 personoj, kiuj rigardas ĉirkaŭ 10 mil paĝojn. Dum 5 jaroj pli ol 10 milionoj da paĝvizitoj. Tiuj personoj ekvidis, ke Esperanto vivas.

En nia regiona televido iu redaktorino diris: „Esperantistoj estas elmortanta popolo”. Ŝi tiel diris, ĉar en sia vivo ŝi neniam renkontis surstrate esperantiston, esperantlingvan libron en librovendejo aŭ biblioteko, esperantlingvan kanzonon, esperantlingvan retpaĝon. Se esperantistoj volas esti „elmortanta popolo” ili daŭre fermu sin en siaj klubejoj kaj posedu apartajn forumojn kaj dissendolistojn „nur por esperantistoj”. Se ni tamen volas esti rigardataj kiel „vivanta popolo” ni devas miksiĝi kun normalaj homoj kaj iliaj ideoj. En niaj urboj tio ne estas ebla ĉar ni estas izoluloj, sed en interreto ni povas esti rigardataj kiel forta kaj multnombra grupo, tio dependas nur de ni mem.

worsten@worsten.org

PS. Miaj retejoj:

Eurogento — <http://eurogento.org>

Familiaj retejoj — „Eurogento” <http://retejoj.eurogento.org>



Tombejo apud Bjalistoko

Katolikaj krucoj kaj malnovaj sepultejoj kun surskriboj en lingvoj – pola kaj latina. Kaj verdaĵo — eksplicita, sukplena, superkreska.

En kvieteco — tra ŝrikado de cikadoj — flustro de apenaŭ aŭdebla ploretado. Ĉe la ŝtona palisaro apud tombeto — vizitantoj: geolduloj — li kaj ŝi — malgrandaj, melankoliaj, unuopaj kaj mizeraj.

Kiu estas sub tiu ĉi verda monteto? Iliaj infanoj aŭ, eble, nepoj?

Mi alproksimiĝas kaj jam malkonfuze aŭdeblas — la flustro:

— *Wieczny odpoczynek racz mu dać Panie...**

Kaj malantaŭ arbustro, super la tombeto situas piramideto kun kvinpinta steleto. Sur la foto – la ridetanta junuleto, kaj sube la surskribo:

«Гв. Сержант Чиннов И. Н.

1927–1944 г.»**

Mi rigardas kun aflikto maljunajn gepolojn kaj pensas: kiu li estas por ili?... Kaj pro kio ili hodiaŭ ploras super lia tombo kaj preĝas por la ĉielpaco de lia animo?...

Sur la teritorio de Pollando kuŝas pli ol 500 mil da sovetiaj soldatoj, kiuj pereis en la jaroj 1944–1945 en bataloj kontraŭ la hitlergermanaj okupantoj de Pollando dum la 2a Monda Milito.

El la rusa lingvo Esperantigis
Stanisław Śmigielski

*...Eternan ĉielpacon donu al li Sinjoro...

** «Gvardia Serĝento Ĉinov I. N.
1927–1944 j.»



Familiaj retejoj — „Worsten” <http://retejoj.worsten.org>

Foraj kuzoj el Eŭropo — <http://worsten.org>

Eŭroponto — <http://europonto.org>

Partnerurboj en Eŭropo — <http://partnerurboj.worsten.org>

Eŭropa junularo — <http://jek.worsten.org>

Eŭropa kanzonamikaro — <http://kanzonamikaro.worsten.org>

Alleum — <http://alleum.org>

Worsten — <http://gento.vorsten.org>

Radikaro — <http://radikaro.worsten.org>

Woytek — <http://woytek.worsten.org>

Preskaŭ ĉio pri la prepozicio PER

La prepozicio **per** ne estas tro ofte uzata de ni, tamen ĝi meritas specialan atenton. **Laŭ gramatika vidpunkto tiu ĉi prepozicio estas montranta:**

1. Instrumenton (ilon), materion aŭ objekton, kiun oni uzas por plenumi (fari) agon aŭ atingi celon. Ekz.: Dum mi hakis lignon **per** hakiĵo, ŝi kudris ion **per** kudrilo. Li plenigis kelkajn botelojn **per** ruĝa vino. Ŝi kovris la tablon **per** blanka tablotuko kaj garnis la vazon **per** floroj. **Per** malakra tranĉilo neniu sukcesos tranĉi la vianĉon. Tiu ĉi artisto pentras **per** oleo kaj akvarelo. Ni varmigas nian domon **per** gaso. Tibetanoj nutras sin nur **per** legomoj kaj fruktoj. Ĉiuj beboj estas nutrataj **per** lakto. Ŝia filo movas sin **per** lambastono. Somere ĉiu povas veturi **per** diversaj veturiloj.

2. Organon aŭ membron, kiun oni uzas por fari ion. Ekz.: Ni vidas **per** la okuloj kaj aŭdas **per** la oreloj. Oni povas ankaŭ ludi **per** la okuloj (okulumoj). La filo tiris sian patrinon **per** la maniko kaj ŝi minacis lin **per** la fingro. La surdmutuloj parolas **per** la manoj. Ŝi grincis **per** la dentoj kaj tremis **per** la tuta korpo. La cikonioj batis la aeron **per** siaj longaj flugiloj. Li tenis sin **per** ambaŭ manoj je la tablo. Mi ne povis rekoni ŝin **per** la unua rigardo, sed mi tuj rekonis ŝin **per** la voĉo.

3. Personon, danke al kiu oni povas plenumi ian agon. Ekz.: Li sen-

dis leteron al ŝi **per** kuriero. Instruisto **per** siaj gelernantoj eksciis multon pri iliaj gepatroj. La funebra ceremonio estis honorigata **per** kelkaj altranguloj. Nia amiko konstruigis al sia amatino belan domon **per** fama arkitekto. Ŝi pentrigis sian portreton **per** fama artisto (ŝi pentrigis, li pentris). La Ĉefa Estraro de PEA estas oficiale reprezentata **per** sia prezidanto.

4. Rimedon, danke al kiu estas atingita ia rezulto. Ekz.: Kanajlo mortigis la knabon **per** unu puŝo de tranĉilo. Ŝtelĉasisto kaptis junan vulpon **per** kaptilo. Ŝi ege imponis al ĉiuj **per** sia elokventeco. Ŝia vizaĝo neniam kovriĝis **per** honto. Li turmentis la patrinon **per** sia insistado. Vortoj kunmetitaj estas kreataj **per** simpla kunligado de vortoj. Oni plej bone instruiĝas **per** siaj propraj eraroj. Ŝi komprenis mian leteron **per** helpo de Esperanta-pola vortaro. Danke al Esperanto Ludoviko Zamenhof kovris sian nomon **per** gloro. **Per** Esperanto estas pli facile kompreniĝadi ol **per** aliaj lingvoj.

5. Manieron, kiel efektiviĝas la ago. Ekz.: Ŝia patro ne mortis **per** natura morto, sed li estis mortigita. **Per** sia konduto ŝi ofte similas al la patrino. Li konatiĝis kun ŝi tute hazarde kaj nuntempe ili vivas **per** unu animo en du korpoj. Post romantika amindumado ili dormis **per** bona dormo. La infanoj ofte krias **per** alta voĉo. Multaj senla-

boruloj vivas **per** mizera kaj kompatinda vivo. Oni ne povas atingi ĉiujn celojn **per** unu fojo. Li komencis sian paroladon **per** varmaj salutvortoj.

6. Potencan aŭ influon, kiun oni alvokas por persvadi iun pri io.

Ekz.: Mi vin petegas **per** ĉielo. **Per** Dio! Mi ne povus tion kredi, se mi ne vidus ĉion **per** miaj propraj okuloj. Mi ĵuras **per** mia honoro.

RIMARKOJ:

❖ Normale oni pagas **per** io, sed se temas pri maniero esprimi la pagatan valoron, oni ankaŭ povas uzi **en**. **Ekz.:** Ŝi pagis la partoprenkotizon **en** eŭroj.

❖ En pasivaj frazoj ni povas iafoje heziti, ĉu uzi **per** aŭ **de**. **Ekz.:** La tablo estis kovrita **per** tablotuko kaj la botelo estis fermita **per** korko (ĉar aktive oni diras: Ŝi kovris la tablon **per** tablotuko kaj li fermis la botelon **per** korko).

Oni tamen skribas: La tero estis kovrita **de** neĝo (ĉar neĝo mem kovris la teron).

❖ En kelkaj okazoj **per** havas sencon de mezuro. **Ekz.:** Ĉiu jaro alproksimigas nin **per** unu paŝo al la tombo. Mi malfruis **per** kelkaj minutoj.

Vortfarado kun la prepozicio **per**:

❖ **pera** = nereкта, uzanta interan rimedon. **Ekz.:** Ŝi instruas Esperanton laŭ **pera** metodo (t.e. ŝi uzas nacian lingvon);

❖ **pere de** = danke al la helpo de iu. **Ekz.:** Li faris la negocon **pere de** agento. Ili geedziĝis **pere de** gazetanonco. Ni interparolis **pere de** interpretisto;

❖ **senpere** = rekte, sen interaĵo, tuj. **Ekz.:** Mi eksciis tion **senpere de** nia direktoro (t.e. rekte de la fonto). La seĝo troviĝis **senpere** apud la lito;

❖ **senpera** = aganta **per** si mem, sen perado de aliaj, (senpera kaŭzo de io);

❖ **peri** = interhelpi, havigi ion al iu **per** sia interveno kaj klopodo. **Ekz.:** Li **peris** al ŝi oficon. Ni povas **peri** abonojn de multaj Esperantaj gazetoj;

❖ **peranto** = homo, **per** kies helpo oni traktas aferojn kun aliaj personoj. **Ekz.:** Li estas **peranto de** UEA (**peristo** = tiu, kiu profesie peradas).

La prepozicio „per” funkcias ankaŭ prefiksoide. Ĝi signifas, ke la ago esprimata de la radiko fariĝas rimedo por atingi iun celon: **perlabori** = akiri ion **per** sia laboro, **perludi** = gajni ion **per** ludo, **perforti** = akiri ion (iun) **per** forto, **perflati** = atingi ion flatante, **permiliti** = akiri ion **per** milito.

Jen kelkaj proverboj kun la prepozicio „per” el la *Proverbaro Esperanta prilaborita de Ludoviko L. Zamenhof*:

- ❖ Per eraro ne praviĝas la faro.
- ❖ Per insulto kaj kolero ne klariĝos afero.
- ❖ Per mezuro kaj peso akiriĝas sukceso.
- ❖ Per mono eĉ silento fariĝas elokvento.
- ❖ Per oreloj, ne **per** okuloj, edzinon elektu.
- ❖ Per lango flatas, **per** mano batas.
- ❖ Per pacienco kaj fervoro sukcesos ĉiu laboro.
- ❖ Per pacienco venas scienco.
- ❖ Per vorto ĝentila ĉio estas facila.

Solena Jubileo de Krakova Societo Esperanto kaj Pola Esperantisto

Dum la tagoj 2–4 de junio 2006, daŭris en Krakovo festado de la Jubileo de cent jaroj de Krakova Societo Esperanto kaj la revuo Pola Esperantisto.

Riĉa kultura kaj arta programo, multaj okazoj por diskuti pri nuna stato kaj la estonto de pola Esperantujo, vizitado de la urbo Krakovo kaj aliaj interesaj okazintaĵoj — kiel kutime allogis konstantan aron da fidelaj amikoj de krakovaj esperantistoj.

Okaze de ambaŭ 100-jariĝoj, KSE kaj la Eldonejo Hejme komune eldonis, furore akceptitan, meditaĵon de Johano Paŭlo la Dua st. „La roma triptiko”. Lukse eldonita, ankaŭ danke al la sponsoroj—antaŭpagintoj, kies liston ni sube publikigas, dankante al ili ĉiuj.

Jen la listo de la sponsoroj:

Bjalistoka Esperanto–Societo

Ewa Bondar

Dorota Burchardt

Tomasz Chmielik

Andrzej Ćwiek

Bogdan Dembiec

Bernhard Eichkorn

Elżbieta Karczewska

Bronisław Kieres

Jolanta Kieres

Małgorzata Komarnicka

Marian Kostecki

Kazimierz Leja

Lidia Ligęza

Hanna Orlewicz

Nina Pietuchowska

PEA Filio en Koszalin

PEA Filio en Lodzo

PEA Filio en Poznań

Teresa Pomorska

Ada Prostacka

Janina Rżany

Bogusław Sobol

prof. Witold Stępniewski

Stowarzyszenie Rodzin Katolickich

Archidiecezji Lubelskiej

Stanisława Szostak

Stanisława Śliwińska

Wydział Kultury UM Krakowa.

(Sinjoron Bogusław Sobol mi tutkore pardonpetas pro erara uzo de la antaŭnomo de lia frato Leszek).

Krom la menciitan libron oni eldonis ankaŭ la kongresajn materialojn (senpagajn por ĉiuj partoprenintoj): (1) Maria Bronikowska, „Pri Janusz Korczak *fluŝtre*”, trad. Irena Szanser (kun silueto de la tradukintino); (2) Marian Kostecki, „Krakovaj kunkreintoj de Esperanto—movado kaj kulturo (1906–2006)”; (3) Marian Kostecki, „Esperanta verkaro de fratoj Zamenhof”. Ĉiuj libroj estas aĉeteblaj en la Eldonejo Hejme.

Pli abundajn rememorojn kaj „fotoreporton” de kol. Andrzej Sochacki ni publikigos en la venonta kajero de PE.



Esperantilo

Ĉe la retpaĝo

www.xdobry.de/esperantoedit/

estas elŝutebla tre interesa kaj atentokapta komputila programo „Esperantilo”, kiu servas por redakti tekstojn kun specialaj Esperantaj funkcioj, ortografia kaj gramatika korektadoj, krome eĉ maŝina tradukado al pola lingvo.

La programon verkis polo, Artur Trzewik. La programo estas libera kaj malferm—fonta, do eblas/iindas adapti ĝin al aliaj naciaj lingvoj.

Josef Shemer (Israelo)

Judaj anekdotoj kaj ŝercoj

Enkonduko al la unua (kaj al aliaj...) anekdoto.

Judaj religiaj studoj (Talmudo) postulas altan intelektualan nivelon por kompreni la pensmanieron de la egzegistoj (interpretistoj) de la Biblio. Tiu pensmaniero nomiĝas hebree Pilpul („piprumado” — akra interdiskutado). Ĝi estas speco de intelekta gimnastiko de la cerbo, konsistanta el teoriaj analizoj de hipotezaj situacioj. Homo, kiu sukcesas disvolvi tiun pensmanieron, povas tre facile krei humuraĵojn, ĉar en plejmulto de la ŝercoj oni trovas teoriajn analizojn de hipotezaj situacioj. Ekzemple:

1. „Talmudista” anekdoto de la tiam tempo en Orienta Eŭropo

Du judoj — junulo kaj plenaĝulo — veturas en trajno de Krakovo al Vieno. Ili sidas proksime unu al la alia.

Demandas la junulo: „Kioma horo estas nun?” Sed la alia ne respondas.

Li demandas denove, sed la alia ne respondas.

Li redemandas, sed la najbaro denove silentas.

Kolere kaptas la junulo la ŝultron de la najbaro kaj krias en lian oreilon: „Eble vi povas diri al mi la horon?”

Ĉi foje li ricevas respondon.

Demandas la junulo: „Ĉu vi povas diri al mi, kial daŭris al vi tiel longe respondi al mi?”

Diris la plenaĝa judo:

„Vidu, la afero estas tia: Se vi demandas kaj mi respondas, ni komencas paroli kaj tiam ni amikiĝos, kaj kiam ni atingos Vienon mi invitos vin viziti mian hejmon kaj proponos al vi aliĝi al miaj familianoj por vespermanĝo. En la manĝo vi renkontos mian filinon — ŝi estas belega kaj ankaŭ vi estas bela — vi enamiĝos je ŝi kaj dezirus edziĝi al ŝi. Mi diros al vi la veron: mi ne dezirus havi bofilon, kiu ne posedas horloĝon...”

Kontinuota